MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

NUMERO PRI LA SCIENC-FIKCIA LITERATURO



HUNGARA VIVO

LITERATURA-ARTA REVUO

2
1976
8-Ft.



Sunsubiro ĉe Balatono

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XV. jaro 1976. 2-a numero

Numero pri la scienc-fikcia literaturo

ENHAVO

Péter Kucka: La scienca fikcio *(Tr. —jes)* 1
Letero al la III-a Tuteŭropa Kongreso de la scienc-fikciaj verkistoj en Poznan 2
Vilmos Benczik: Scienca fikcio kaj Esperanto 4
William Auld: La infana raso IX. 6
Isaac Asimov: La unua leĝo *(Tr. W. Auld)* 7
Sándor Szathmári: Leciono de historio 8
Jorge Luis Borges: La domo de Asteriono *(Tr. VHZs.)* 9
Konisi Gaku: La kosmo-elmigrado 10
Vladlen Bahnov: Al la steloj *(Tr. M. F.)* 12
Győző Csorba: Ĉe sojlo de kosmo *(Tr. M. Fejes)* 12
Gyula Fekete: Fantaziaj historioj el la jaro 2975-a *(Tr. L. R.)* 13
G. H. Mc Cluskey: La fina inventaĵo de s-ro Braun 14
Scienc-fikciaj verkoj en Esperanto *(Komp. Maria Benczik)* 14
István Nemere: La kolektanto 15
Zsuzsa Varga-Haszonits: Mallonge pri la hungara scienc-fikcia literaturo 16
Zora Heide: Mistera hotelo 18
Ferenc Molnár: La ludisto *(Tr. D-ro István Nagy)* 20
Forpasis Kalocsay 21
Humphrey Tonkin: Reĝo Lear kaj la universaleco de Shakespeare 22
Giorgio Silfer: Pri la stilo de „Maŝinmondo" 25
Albert Goodheir: Poemoj 26
Studenta paĝo 28
Leterkesto, Korespondi deziras 29
F. J. Transilvania Hungara Vorthistoria Kolektaĵo 30
V. B. Recenzo 30
Humuro 30
Paĝo de FERI 31

Sur la titolpaĝo: Illustraĵo el la revuo „Galaktika"

Péter Kuczka:*

LA SCIENCA FIKCIO

Ĝiajn antaŭaĵojn ni povas trovi jam en pra-epokaj sonĝoj, legendoj kaj mitoj. Tiutempe la homo nur eksperimentis per sia scio, sed en siaj sopiroj li estis jam malmodera kaj realigis ĉion. Homero mencias jam la robotojn, Luciano veturigas siajn heroojn al la Luno, arabaj legendoj rakontas pri flugantaj tapiŝoj, hindiaj epopeoj pri miraklaj armiloj de dioj, Kalevala pri la mirakla muelilo.

La unua scienca revolucio inspiris la verkistojn: Verne, Robida, Jókai, Poe, Zulawski kaj Kurd Lasswitz, por mencii nur la plej gravajn nomojn. Kune kun la dua teĥnika kaj scienca revolucio venis Wells kaj liaj sekvsekvintoj: Ĉapek, Karinthy, Huxley, Rosny la pli maljuna, kaj aliuloj, verkistoj, kiujn peze ŝarĝis la rekono de la nekredebla forto de la scienco, kiuj konsterniĝinte rigardis ties duoblan Janus-vizaĝon, meditis pri la ebloj de la futuro, antaŭkonjektis la inferon kaj paradizon.

Je la mezo de nia jarcento jam aperis en sia arta pureco la scienca fikcio, arto kaj literaturo de nova aspekto, kiu komencis paroli pri temoj neglektataj, komencis esplori la homon, ekipitan per teĥniko kaj scienco, serĉante lokon por li en la dimensioj de la senfina tempo kaj spaco, aŭ en tiu nova naturo, kiun li kreis ĉirkaŭ si.

Komence ĝi estis ravita de teĥnikaj mirakloj, maŝinoj, spacveturiloj, mortradioj kaj aliaj inventaĵoj, ĝi do ekposedis kaj disvastigis la spacon, sendis siajn heroojn en la mikro-, kaj makrokosmon.

Poste spertinte la historion de la XX-a jarcento ĝi retiriĝis de la malproksimaj mondoj, de la fora futuro de la galaksioj — al niaj tagoj, sur la Teron, al la zorgoj kaj taskoj de la nuntempa homaro, kies taskoj montriĝis same fantaziaj kiel la spacesplorado aŭ tempvojaĝo. Anstataŭ aventuroj venis demandoj moralaj, sociaj, politikaj. La scienca fikcio hodiaŭ jam deklaras sin heredanto de utopioj, kaj ĉiam pli rajte, ja ĝi faras planojn, revas pri solvo de niaj zorgoj, meditas pri pli bona, pli justa aranĝo de nia mondo.

En la centro de la scienca fikcio staras la homo, kaj ĉiam pli la homo konsideranta la terglobon sia patrio, la homo volanta sin liberigi de antaŭjuĝoj, kaj klopodanta pri la reciproka kompreno.

La ĉefa problemo en la historioj pri spacveturoj jam ne estas la interplaneda milito, sed tiu viva zorgo: kiumaniere ni interkompreniĝu kun la loĝantoj de Marso, kun tiuj de Taŭ Zeti, kun inteligentaj vivuloj de malproksimaj galaksioj, mallonge: kun la „fremduloj".

La verkistoj de scienca fikcio hodiaŭ jam pli ofte serĉas tion, kio nin kunligas, ol tion kio disigas nin. La problemoj, la zorgoj estas komunaj kaj tuŝas la tutan homaron; por solvi tiujn estas bezonata kunlaboro kaj kompreno. — Ni serĉu la komunan lingvon — oni diras, kaj ni devas kompreni tiun ĉi frazon foje laŭvorte, foje figurasence.

La Marsanoj aŭ „fremduloj" de la pli fruaj sciencaj fikcioj estis monstroj, kontraŭuloj, atakantoj kaj koloniigantoj. Sed Bradbury deklaris, kion ni jam pli frue sciis aŭ konjektis: ni, Teranoj estas la „fremduloj" kaj kontraŭuloj. Sub la maskoj ni trovas homajn trajtojn, foje timemajn, foje deformitajn homajn vizaĝojn, kiuj tamen ĉiam volonte glatiĝus, volonte ekridetus. La scienca fikcio — almenaŭ ĝia pli bona parto — ankoraŭ kredas, ke la homoj ne estas fundamente malamikoj unu de la alia, ĝi kredas la unuiĝon kontraŭ komuna danĝero.

Ĉi-tion mi volas emfazi en tiu ĉi revuo, kies celo estas finfine la sama: helpi la reciprokan komprenon, trovi la komunan lingvon, — kio hodiaŭ ankoraŭ ŝajnas esti utopio kaj en la scienca fikcio kaj en Esperanto. Sed la utopioj ja multe pli rapide realiĝas, ol ni kredus tion. Kaj preskaŭ nerimarkeble...

Kaj — ni primemoru diraĵon de Oscar Wilde — mondmapo, sur kiu ni ne trovas desegnita la insulon de Utopio — ne meritas eĉ nian unusolan rigardon.

Tr.: — jes

---

* *Redaktoro de la revuo „Galaktika", ĉefsekretario de la Asocio de Eŭropaj Sciencfikciaj Verkistoj.*

Letero al la III-a Tuteŭropa Kongreso de la sciencfikciaj verkistoj en Poznan

Estimata Kongreso!

La sciencfikciaj verkoj en la pasintaj jardekoj kreis la plej junan ĝenron (pli precize: temaron) de la literaturo. La populareco de tiaj verkoj — mezurebla per rapidega kresko de nombro de la aperintaj noveloj, romanoj, teatraĵoj, filmoj, eseoj kaj sciencfikciaj revuoj; kaj per la kresko de ties legantaro — superas eĉ la popularecon de la tradiciaj ĝenroj. Tiun grandan interesiĝon kaj simpation (precipe inter la junaj legantoj) ni povas klarigi per la noveco kaj specialeco de la temoj kaj direndaĵoj de tiu literaturo.

La okazaĵoj de la plej multaj sciencfikciaj verkoj datiĝas aŭ al la proksima, aŭ al la fora futuro, do iliaj aŭtoroj por aŭtentigi la signitajn tempajn, mediajn, kaj agadajn situaciojn — krom la tradiciaj rimedoj kaj rezultoj de la arta ekkono — devis ekuzi ankaŭ metodojn de la scienca ekkono.

La verkado en ĉiu epoko estis — kaj restas konstante — la plej supera respondeco por niaj homfratoj, kaj nur tiuj verkoj povis fariĝi vera arto utila, nur tiuj fariĝis efika konsci-, kaj karakter-formiva forto, nur tiuj sukcesis rezisti kontraŭ la tempopaso kaj akiri eternan vivon, kiuj levis la voĉon por la prospero, por la pli humanaj vivkondiĉoj de la homoj, por la granda afero de la progreso de la homaro. Ni opinias, ke la sciencfikciaĵoj, kiel ĝenro prezentanta la estonton de nia homaro per literaturaj rimedoj — precipe devas surhavi la plej gravajn signojn de humaneco, kaj tiujn de arta verkado.

La 3,8 miliardojn superanta homaro vivanta hodiaŭ sur nia Terglobo — parolas ĉirkaŭ 3000 lingvojn, kaj tiu ĉi babela stato, kaj ties nekalkulebla spirita kaj materiala malŝparo estas unu el la plej gravaj pestaĉoj de nia epoko. El la radio, — kaj televid-aparatoj, el la gazetoj, libroj kaj konversacioj inundas nin ĉiutage tiom granda aro da informoj, ke la kompreno kaj prilaboro jam estas neebla per malnovaj rimedoj eĉ en la plej gravaj elektitaj terenoj por interesiĝantaj unuopuloj.

La specialiĝintaj fakuloj hodiaŭ jam ne sukcesas trarigardi eĉ onon de la nune tutmonde aperantaj ĉirkaŭ 100 000 fakrevuoj, por plenumi tion oni devus bone koni minimume la 4—5 plej gravajn lingvojn (angla, franca, germana, hispana, rusa), sed pri tia kapablo la plejmulto de niaj scienculoj ne povas fieri. La nombro de la fakrevuoj gis la 2000-a jaro superos unu milionon. Ni atingis, ke por la inventisto estas pli facila afero eksperimente eltrovi iun novaĵon, ol elfosi el inter la paperaj montoj la antaŭaĵon aŭ informon pri la — eble ie jam naskiĝinta — rezulto. Nuntempe ĉirkaŭ 250 milionoj da homoj trapaŝas la landlimojn en unu jaro, por ĉirkaŭrigardi en la kortumo de la aliaj popoloj, sed la ebla ekkono restas sur mizere malalta nivelo, ĉar la plejmulto de niaj vojaĝemaj samepokanoj ne parolas la lingvon de tiuj ĉirkaŭ dek landoj, kiujn ili vizitas aŭ traveturas. La ridinda spektaklo de la homo „parolanta" per praaj mangestoj — memorigas nin eĉ nun pri la iamaj prauloj.

Tiu ĉi eksterordinare peza problemo tamen apenaŭ aperas en la tuta sciencfikcia literaturo. En la historioj okazantaj post kvindek, kvincent aŭ post mil jaroj, la diversnaciuloj parolas tiel, kvazaŭ ilin ne disigus la lingva diferenco, aŭ kvazaŭ la problemo estus jam delonge solvita.

Malgraŭ tio la sciencfikciaj verkistoj en iliaj future datitaj historioj malmulte parolas pri tio: kiam kaj kiel oni solvis la problemon. Tamen, la realaĵo estas tia, ke la kvanto kaj la bezono de la lingva komunikado en la venontaj jaroj ankoraŭ pli rapidege kreskos, kaj en antaŭvidebla tempo tiuj devigos la komunumon de la landoj, ke en la plej supera internacia forumo, en la kadro de UNO oni prenu en programon trovon de la solvo.

Ni menciu ankoraŭ mallonge, ke por la sciencfikciaj verkistoj — eĉ pli ol por iliaj kolegoj verkantaj en aliaj ĝenroj — estus pli grave legi kiel eble plej frue la diverslingve aperintajn verkojn, por ke ili, kiuj dum tiel mallonga tempo organizis siajn renkontiĝojn, forumojn — helpe de komuna peranta lingvo multe pli efike povu interŝanĝi siajn pensojn.

Pro la ĵus menciitaj ni turnas nian leteron ĝuste al Vi, kiuj eĉ pro multaj kaŭzoj povas pli forte senti la preskaŭ paralizigajn rezultojn de la hodiaŭa babela stato.

Pluraj konataj lingvistoj (Edward Sapir, Mario Pei, Géza Bárczi, Mahomed Isajev, ktp.) opiniis tre ekzistanta kaj dolora fakto la diverslingvecon de la homaro, respektive mankon de komuna interlingvo kaj trovas la problemon urĝe solvenda. Ili jam rekonis ankaŭ tion, ke la solvo dependas unuavice ne de lingvistoj, sed de politikistoj. Kaj la politikistoj, kiel ni aŭdas-vidas el la tagaj novaĵoj — provizore plenforte luktas kun sortproblemoj pli minacaj ol la babela ĥaoso: forigo de termonukleaj militoj, la naturon pereiganta medi-malpurigo, kun la dramo de malsat-plago al centmilionoj, kaj kun tiu de tropopolumiĝo, kun la analfabetismo, kripliganta miliardon de niaj homfratoj.

Tiel memkompreneble sin proponas la labordivido: por la kondiĉoj de la interhoma kaj al homoj inda interkompreno la necesajn paŝojn de inicianto faru mem la majstroj de la vortoj: verkistoj, lingvistoj, scienculoj.

La plejmulto de niaj pensantaj samepokanoj, — kaj ni esperas, ke ankaŭ Vi ĉiuj, — jam rekonis: en tiu lingva ĥaoso la popoloj de mondo bezonas iun, de ĉiuj landoj konsentitan, en la kadro de UNO akceptitan interlingvon. Tamen, centoble pli malfacile estas de tiu rekono atingi la ĝuste respondendan altruisman demandon, kiu tamen rekonas la suverenecon de ĉiuj popoloj kaj lingvoj: kiu estu do tiu lingvo?

El inter la ĵus menciitaj lingvistoj precipe du famaj scienculoj de Usono: Edward Sapir kaj Mario Pei

konturis precize al kiuj pretendoj devas respondi internacia peranta lingvo. Ili kaj aliaj lingvistoj jam menciis tiun laŭspertan fakton, ke ĉiu nacia lingvo, se ĝi funkcias kiel peranta lingvo trans la limoj de sia popolkomunumo, obeante al sia karaktero ne povas resti neŭtrala, ĉar portas kulturon kaj literaturon de sia popolo, kaj disvastigas oficialan ideologion, politikajn aŭ potencajn ambiciojn de sia lando.

En tiu funkcio do ĉiu nacia lingvo ofendus la kulturon kaj suverenecon de ĉiuj aliaj popoloj, la purecon kaj ekziston de la aliaj lingvoj.

Konsiderante ĉion ĉi, ni devas deklari, ke la grava problemo estas solvebla nur per iu konstruita lingvo, kiu ne havas bazon de iu grandpotenco, minacas apartajn interesojn de neniu lando, endanĝerigas la kulturon kaj la gepatran lingvon de neniu nacio, ĉar en sia modesta peranta funkcio ĝi ne volas paŝi en la lokon de iu lingvo, nur apud ĝin, kiel la plej konvena rimedo de praktika bezono.

El inter la ĝis nun konataj 912 artefaritaj lingvoplanoj (kies ĉefajn indikojn pasintjare publikigis A. D. Duliĉenko en Sovetunio) sole unu, ekirigita de la pola Zamenhof en la jaro 1887, kaj ekde tiam pliriĉiĝinta koncerne sian vort-trezoron kaj esprimivan flekseblecon, — sole Esperanto estas la plej konvena por plenumi la funkcion de interlingvo. Tiu ĉi lingvo estas neŭtrala, havas logikan strukturon, ne konas lingvajn esceptojn, estas belsona, fonetika, kaj homoj de ĝenerala klereco kaj de ĝenerala lingvokapablo dum mallonga tempo (ĉirkaŭ 200 horoj) povas ĝin lerni bone. Pri tio, kiomgrade ĝi estas vivanta lingvo — atestas originala literaturo ampleksanta 2000 volumojn, kaj ĉ. je 30 000 volumoj taksebla tradukliteraturo, 104 gazetoj aperantaj tutmonde, kaj la aktiva laboro de ĝia mondasocio, membrigita de UNESKO en la jaro 1954, krome ankaŭ la grandaj amasoj de ĝiaj adeptoj.

Verkistoj kaj scienculoj, kiuj posedas pli superan klerecon kaj lingvokapablon ol la ĝenerala, povas alproprigi Esperanton post kelksemajna aŭ monata lernado.

Jam menciite, kial ĝuste al Vi ni turnis nin perletere: pro tio, ĉar Vi devas scii pri via epoko, pri la futuro de la homa raso pli ol viaj kolegoj aliĝenraj. Vi dum verkado senĉese rigardas al la proksima kaj fora estonto, Vi estas do pli impreseblaj koncerne ĉion, kio povas okazi, kaj kio okazu kun niaj homfratoj en la nin renkontontaj jardekoj, jarcentoj.

Tial ni, subskribintoj de tiu ĉi letero, konsente kun la estraro de Universala Esperanto Asocio proponas:



Desegno de Jenő Izsák

1. La kongreso EUROCON III. prenu en sian programon diskuton pri la problemoj de la diverslingveco, kaj kiel ties solvon: akcepton de Esperanto por oficialaj kontaktoj en la internaciaj organizaĵoj de sciencfikcia literaturo, kaj ĝian akcepton por plifaciligi la rilatojn senperajn, kolegajn inter la sciencfikciaj verkistoj.

2. Akcepto de Esperanto, provizore kiel unu el la laborlingvoj, kiu post malmulte da tempo, pro ĝiaj eksterordinaraj avantaĝoj, pruviĝontaj el la praktika provo — povos fariĝi la unua laborlingvo.

3. Se Via Kongreso nun ne povas fari decidon, ni proponas al Vi por la plua esploro de la temo fondi laborgrupon, kiu povos prezenti sian opinion al la sekvontaj internaciaj kunvenoj.

4. En la scienc-fikciaj revuoj, sed ankaŭ en memstaraj volumoj gravan rolon plenumus esperantlingva enhavtabelo respektive resumo.

5. Estus utile estigi kontaktojn inter la internaciaj organizaĵoj de sciencfikciaj verkistoj, kaj Universala Esperanto Asocio, priparolo de la komunaj temoj, kaj kiel rezulto de tiu kunlaboro: ekzemple eldono de esperantlingva revuo de sciencfikcia profilo (kiu ĝuste pro la ĵus menciita komprenebleco) baldaŭ povus fariĝi eĉ centra internacia organo de la sciencfikcia literaturo.

Al Via verkista laboro kaj al la nuna interkonsiliĝo ni deziras al Vi multe da sukceso!

1976, aprilo

Vilmos *Benczik*
tradukisto

Zoltán *Csernai*
verkisto-redaktoro

Gyula *Fekete*
verkisto

Mihály *Gergely*
verkisto-redaktoro

András *Sugár*
ĉefkunlaboranto de la Hungara Televido

Kunĉo *Valev*
redaktoro

Tr.: M. *Fejes*

Scienca fikcio kaj Esperanto

La hungarlingva sciencfikcia revuo *Galaktika* portas konstante sur la dorsflanka kovrilo interalie la eldirojn de Fred L. Polak kaj Michel Butor. „La scienca fikcio estas hibrida produkto, kiu ofte estas nek scienco, nek literaturo en la vera senco de la vorto" — argumentas Polak. Kaj Butor skribas jene: „Ŝajnas, ke la scienca fikcio estas establiĝinta formo de la mitologio de nia epoko: ĝi estas formo, kiu kapablas ne nur lanĉi tute novajn temojn, sed ankaŭ ensorbi la tutan temaron de la malnova literaturo." La supraj du kontraŭaj opinioj montras, ke la scienca fikcio estas tia fenomeno de nia kulturo, kiu vaste ekzistas, sed ankoraŭ ne elmilitis por si ĝeneralan rekonitecon.

Tamen, antaŭ ol aliri nian temon ni haltu iom por pripensi, ĉu la termino *scienca fikcio* estas vere bona? (Ni aldonu, ke tiu ĉi terminologia malcerteco ne estas problemo propre Esperanta — en pluraj naciaj lingvoj oni diskutadas, kiel traduki la anglan *science fiction?)* Nu, *scienca fikcio* estas perfekta kaj bonsona traduko de la anglaĵo, kaj verŝajne neniu alia esprimo povos venki ĝin. Tamen, konkurantoj ekzistas.

Giorgio Silfer en sia interesa kaj informriĉa artikolo *SF=Science Fiction,* aperinta en Literatura Foiro (1970, decembro) uzas *fantascienco* kaj *anticipoo.* Verŝajne ili ne estos longvivaj, ja la unua utiligas la pseŭdoprefikson *fanta-* kaj fakte kreas neologismon. Same estas neologismo la vorto *anticipoo,* eĉ iom strangaspekta pro la *-oo.* Krome, ĝi eĉ iom malvastigas la sencon, ja sciencfikcia verko ne ĉiam estas samtempe anticipaĵo. Pli bonvena estus la vorto *scienca fantazio, sciencfantazia,* uzita de T. Carlevaro en *Esperanto en Perspektivo,* tamen, verŝajne ĝi same ne povos tute anstataŭi la esprimon *scienca fikcio,* kaj nur donus plus unu paralelaĵon al nia literatura terminologio, sufiĉe malekzakta jam eĉ sen tio.

Revene al la scienca fikcio mem, ni rezignu pri la jam sufiĉe pritraktita socia genezo de tiu literaturspeco, kaj prefere provu difini, kion ni komprenas sub tiu nocio. Ekzistas du opinioj, sufiĉe kontraŭaj. La unua konsideras scienca fikcio nur verkojn, kiuj strikte ligiĝas al iu scienca inventaĵo, kaj la agado de la verko disvolviĝas en teknika civilizacio multe pli evoluinta, ol la nia. Tiu ĉi koncepto rifuzas konsideri scienca fikcio ankaŭ verkojn klasikajn, kiuj pritraktas temojn proprajn al la scienca fikcio, tamen la teknika aspekto ne ricevas centran rolon, kiel ekzemple en la verkoj de Swift. Konfesantoj de tiu ĉi koncepto emas rigardi sciencan fikcion nur kiel specon de poramuza literaturo, kaj verkojn sciencfikciajn, kiuj respondas ankaŭ al altaj literaturaj pretendoj, simple ekskludi el ĝia sfero. Tamen, tiu ĉi koncepto lamas, ja laŭ ĝia analogio ekzemple la detektivaj verkoj de Chesterton same ne povus klasiĝi detektivromanoj, kio estas evidenta absurdaĵo. Scienca fikcio ne povas permesi al si rezignon pri la plej bonaj kreaĵoj de tiu literaturspeco.

En tiu ĉi artikolo ni rigardas scienca fikcio ankaŭ utopiojn, certajn specojn de filozofiaj romanoj, iujn verkojn, en kiuj la fantaziaj elementoj havas centran rolon, kaj eĉ sociajn satirojn, kiuj utiligas la groteskon.

Certaj tipoj de la larĝe komprenata scienca fikcio estas sufiĉe indiĝenaj en la originala literaturo. La unua tia tipo estas *utopio,* ja memevidente, ke esperantistoj, kies strebadon tre ofte oni nomas *utopia,* mem ŝatas utopiojn. Jes ja, esperantistoj — kun malmulta escepto — estas homoj, kiuj ne estas kontentaj pri iuj aspektoj de la socio, en kiu ili vivas, kaj la plimulto el ili havas sian idearon pri la perfekta ŝtato aŭ organizmaniero de la vivo. En la utopioj — precipe la malnovaj — relative malgravan rolon ludas la atingoj de la *natur*sciencoj: la verkistoj priskribas sian „idealan socion" aplikante siajn *soci*sciencajn tezojn, ĉu atentindajn, ĉu naivajn. Tiaj utopioj estas en la originala literaturo — kompreneble de malsama filozofia nivelo — la *Inferio* de Hindrik J. Bulthuis kaj la unua parto de la *Vojaĝo al Kazohinio* de Sándor Szathmári. Iom parencas al tiu tipo ankaŭ la *Nova Sento* de Hyams, kaj tre verŝajne la praa verko *En la jaro 2112* de J. U. Giesy kaj J. G. Smith. (Pri la lasta mi trovis mencion nur en la artikolo de G. Silfer, citita supre.) Tiujn utopiojn karakterizas la priskribo de socio, funkcianta je konsiderinda tempa, tamen ofte nur loka distanco de la nia. Bedaŭrinde la utopioj de la originala literaturo ofte baziĝas sur ideoj religiaj aŭ moralismaj, kaj nur malofte raciaj. (Elstara escepto estas la *Vojaĝo al Kazohinio* kies angla traduko — post kvar hungarlingvaj eldonoj — pasintjare publikiĝis en Budapeŝto.)

Apartan specon formas inter la originalaj sciencfikciaĵoj la verkoj de Jean Forge. Oni kutimas klasigi scienca fikcio la romanojn *Saltego post jarmiloj* kaj *Mister Tot aĉetas mil okulojn,* krome ankaŭ kelkajn pecojn el la novelaro *La Verda Raketo.* Nu, tiuj ĉi verkoj — se konsideri ilin entute sciencaj fikcioj — nepre apartenas al la poramuza branĉo de tiu literaturspeco. Malgraŭ tio, ke ĉiuj tri enhavas sciencfikciajn elementojn, tiuj nenie dominas: en *Saltego trans jarmiloj* kaj *La Verda Raketo* ĉefas la humora aspekto, en *Mister*

Tot aĉetas mil okulojn la detektiva. Verŝajne, ke la nun pretiĝanta longa Forge-novelo pri la Esperantistoroboto (vidu la intervjuon kun li en Literatura Foiro, 1975, aprilo) daŭrigos la prezentmanieron de *La Verda Raketo.*

Estas evidente, ke el la ĝis nun pritraktitaj tipoj estas pli valora la unua. Tamen, ĉiu leganto povas konfirmi, ke leginte la menciitajn librojn, oni demetas ilin kun ioma mankosento, eĉ la vere altkvalitan romanon de Szathmári. Kial? Nu, bona sciencfikcia verko (kaj fakte ne nur sciencfikcia) devas nepre enhavi du elementojn. La *unua* estas bona, originala, frapa ideo, kiu estas sufiĉe nekutima, surpriza, tamen ne absurda. Tion oni havas ĉe Szathmári, tamen ne en la verko de H. J. Bulthuis. Ĉi lasta prezentas en la *Inferio* ideon infane naivan, kaj kio eĉ pli ĝenas, milfoje priverkitan. La *dua* estas prezento varia, multkolora, do, kreo de amaso da fantaziaj detalelementoj, kiuj servu kiel adekvata, inda fono por la originala ideo. Gravas ankaŭ atentostreĉa historiotekso, kiu tamen tikladu unuavice la inteligenton kaj imagemon de la leganto, ne la sensojn. Kaj tiu ĉi dua elemento mankas ĉe Szathmári: la linea historiotekso, la predikemaj figuroj, la didaktikaj dialogoj multe paligas la verkon. Bulthuis estas verkisto multe pli sperta, sed el plata ideo neniu lerto povas sorĉi valoran verkon.

La plej nova tipo de la sciencfikciaĵoj estas malmulte reprezentita en la originala literaturo. En tiu ĉi tipo fakte aliĝas ankoraŭ unu elemento al la supre eksplikitaj du, nome, prezento de teknike evoluinta civilizacio — ĉu kiel „ĉefrolanto", ĉu kiel fono — fare de naturscience kaj sociscience pli-malpli *kompetenta* aŭtoro. Ne estas hazardo, ke multaj el la sciencfikciaj aŭtoroj estas specialistoj de iu branĉo de la natursciencoj, kiel ekzemple Fred Hoyle aŭ Isaac Asimov. Tamen, necesas emfazi, ke ankaŭ tiu ĉi tipo de verkoj ne malhavas socian ligitecon. Ĉi tie ĝi ne aperas kiel kompleta skemo por iu ideala socia organiziĝo, sed projekciado de iuj nuntempaj danĝeraj agoj de la homaro al la estonto, kaj averto pri la okazontaj konsekvencoj. Tio okazas unuavice koncerne la armadon kaj la polucion. Konsiderante la amasan popularecon de la scienca fikcio, oni povas aserti, ke tiamaniere ĝi kapablas — pere de efiko al la publika opinio — certagrade influi la socion, por ĉesigi la estont-danĝerigan agadon. Cetere, ankaŭ la du esperantistaj aŭtoroj, kiuj kreis originalajn verkojn — tamen nur novelojn — de tiu ĉi nova tipo, Szathmári kaj la japano Konisi, estas inĝeniero, respektive fizikisto. Al tiu speco de sciencfikcia literaturo apartenas la pliparto de la verkoj en la volumo *Maŝinmondo* de Szathmári, kaj ĉiuj en la libro *La kosmoŝipo „Edeno n-ro 5"* de Konisi. Tiuj du verkoj certe estus aprezataj ankaŭ en nacilingvaj medioj: la noveloj de Szathmári rikoltis bonan sukceson en la hungara lingvo, kaj baldaŭ aperos hungare ankaŭ kelkaj noveloj de Konisi. Bedaŭrinde, la reeĥo, kaj ĉefe la aĉetado de tiuj du verkoj en Esperantujo tute ne aspektas kontentiga. Oni emas pensi — eble ne tute senbaze — ke nia legpubliko estas iom tro konservativa. Tamen, produktado de tiaspecaj noveloj — kaj eble romanoj — akcelus la egalrangiĝon de la originala siencfikcia literaturo kun la nacilingvaj. Kaj ke tio eblas, ilustras ankaŭ la certe interesa novelo de la hungaro István *Nemere* en tiu ĉi numero de H. V.

Estas bedaŭrinde, ke la originalprozaj konkursantoj de la Belartaj Konkursoj preskaŭ neniam provas atingi sukceson per scienca fikcio, kvankam verŝajne la juĝkomisiono volonte akceptus tiajojn.

Krom la menciitaj verkoj troviĝas en la originala literaturo multaj prozaĵoj, kiuj estas pli-malpli sciencfikciaj. Mi pensas unuavice pri la noveloj kaj unuaktaĵoj de Marjorie Boulton (precipe en la volumo *Okuloj),* pri iuj de John Francis (en *Vitralo),* kaj montras sciencfikciajn elementojn ankaŭ kelkaj pecoj de la novelaro de Julia Pióro *El tero kaj etero.* La sciencfikcia poezio — ankoraŭ pridubata ankaŭ en la nacilingvaj literaturoj — ĝis nun fakte ne naskiĝis en Esperanto, sed estas nekontesteble, ke kelkaj ĉapitroj de *La Infana Raso* enhavas iujn ĝermojn de io tia.

Estas interesa kaj ekzameninda la duobla lingva problemo de la sciencfikciaj verkoj. La unua aspekto de tiu duobla problemo estas pure lingvistika, nome, la aŭtoro de sciencfikcia verko devas elpensi vortojn por nomi neekzistantaĵojn aŭ por emfazi la malidentecon de io kun la ŝajna ekvivalento en nia civilizacio. Tiaj estas la propre kreitaj vortoj de Szathmári en *Vojaĝo al Kazohinio: hino, bukuo, kazoo,* ktp. La dua aspekto estas socia, nome, certa parto de la agado de la sciencfikciaj verkoj okazas en la estonto, kaj sekve en unuiĝinta mondo, kaj estas demando, kiel la lingva problemo estis solvita, se entute ĝi solviĝis.

Ni ne preteratentu, ke en Esperanto ekzistas ankaŭ sciencaj fikcioj, tradukitaj el naciaj lingvoj. Ĵetinte rigardon al la listo de la plej gravaj titoloj, evidentiĝas, ke la konsisto ne montras troan variecon, tamen frapas la okulon, ke krom la verko de Orwell kaj Nesvadba tradukiĝis ekskluzive nur verkoj, kiuj akiris por si rekonon ankaŭ ekster la kadroj de scienca fikcio. Estas notinde, ke krom la menciitaj verkoj la lasta titolo — *La alia pasinteco (verkita* de Rico Bulthuis en la nederlanda lingvo, kaj ne *tradukita,* kiel skribas Silfer; la tradukon faris Julia Isbrücker) — aperis antaŭ 24 jaroj, en 1952! La nuntempaj plej elstaraj aŭtoroj, kiel Ray Bradbury, Isaac Asimov, Stanislaw Lem aŭ Efremov tute ne estas reprezentitaj en nia lingvo. Tion ĉi tamen oni komprenu nur kiel konstaton, kaj ne nepre kiel pledon.

Por la Esperanta kulturo pli bonvena ol tradukado de ĉefaj valoroj de la monda produkto estus vigliĝo de la originala sciencfikcia verkado. Ja Esperanto kaj scienca fikcio estas du aferoj, tre parencaj inter si. Ambaŭ enhavas kiel ĉefajn elementojn la respekton de la racio kaj la internaciecon, eĉ, universalecon. Ambaŭ kuraĝas aŭdace uzi la homan imagkapablon, pritraktante problemojn de la estonto, kaj pro tio suferas ne malofte mokadon flanke de homoj, ne sufiĉe klarvidaj. Kaj ambaŭ pledas por pli bona mondo.

Vilmos *Benczik*

WILLIAM AULD:

LA INFANA RASO
IX.

„. . . tiel longa kronologia distanco troviĝis
inter Sargono Unua kaj Aleksandro la Granda
kiel troviĝas inter Aleksandro la Granda
kaj la nuna epoko, kaj
samtiel longe antaŭ Sargono Unua
la homoj loĝadis en urboj
sub rego sumera
praktikante religion
kultivante la teron
sekve:
oni rajtas aserti
ke duono de la civilizodaŭro
kaj la ŝlosiloj al ĉiuj ĝiaj ĉefaj institucioj
estas troveblaj antaŭ Sargono Unua".
„Kiam certa nombro de unuoj
de hidrogeno kaj oksigeno
kuniĝas
ili logas unu la alian sen ekstera impulso
kaj akvo rezultiĝas. Ne necesas supozi
*ian akvo-sion**
kiu volis unuigi la du elementojn
kaj por krei sin el ili".
„. . . iom paradokse, mortpuno eble
anstataŭ timigi aliulojn,
instigas ilin iri la saman vojon".
Wong Su-Ling: „Mi eklernis la anglan kaj
informiĝis
ke 'la kato vidas la raton'.
Mi rememoris la frazojn kiujn mi lernis
dum mia unua tago en nia familia lernejo:
'La homnaturo estas origine bona'.
Edukado angla ŝajnis malpli filozofia".
Pri la abolo de mormona komunumo:
„En tiu ĉi vilaĝo la infanoj estas pli bone edukitaj
kaj multe pli ĝentilaj
ol la kutima infano usona. Malgraŭ malriĉego
ili estas fortaj kaj ruĝvangaj.
San-oficialuloj malkaŝe konfesis
ke oni ne havas kaŭzon
plendi pri la fizika aŭ emocia statoj de la
komunumo.
Oni maltrankviliĝis pro la morala demando".
„Nek la katolika eklezio
nek la anglaj enmigrintoj en Irlando
povis detrui la sanajn morojn de la antikva
nobelaro
en Ulstero, kie
dum la regado de Elizabeta
la grandioza O'Cane mem
kiu parolis tiel flue la latinan kiel la propran
lingvon
bonvenigis boheman nobelon
al la halo de sia Granda Domo
kie li kun siaj dekses sinjorinoj
sidadis nudaj
kaj invitis la embarasitan kaj senentuziasman
fremdulon
sin malvesti kaj senti sin komforta".
„Se oni atakas doktrinon, opinion aŭ ian stultaĵon
estas notinde
ke oni ne nepre atakas la homon
aŭ ni diru la 'fondinton'
al kiu ĝi estas atribuata
aŭ kiun oni kulpigas pri ĝi.
Tre povas esti ke oni batalas kontraŭ
la sama idiotaĵo
kontraŭ kiu li batalis
kaj en kiu pro pigreco
pro stulteco
aŭ simple ĉar ili
(kaj/aŭ li)
turnis sian ĉefan atenton al iu alia celo
ekzemple iu malsano de la epoko
bezonanta tujan kuracilon
refalis liaj sekvintoj.
Konstruanto de kontraŭmaraj bariloj
ne nepre malaprobas irigacion".
„Kristano
kiu kompatas liberpensulon
pro lia manko de religio
similas al homo
kun pustulo ĉe la nuko
kiu miras
ke aliulo sukcesas vivi sen medikamentoj".
„La studadon de konusaj sekcoj elpensis Menaĥmo,
lernanto de Platono,
ĉirkaŭ 350 a. k.
kaj ĝin perfektigis
Apolonio kaj Pappo.
Dum mil ol okcent jaroj ĝi maturiĝis.
Poste naskiĝis Kepler, kies leĝoj pri planeda
movado
kondukis al la gravita teorio de Neŭtono
kaj la tuto de ĉiela meĥaniko esprimiĝis laŭ
konusaj sekcoj.
Tiel la longe mortintaj serĉantoj de
senutilaj
konoj
estis en 1609 akuŝistoj ĉe la naskiĝo de
moderna kosmologio".
„La flamon, kiu eliĝis el la supro de la monto
Mosiklo
sur la insulo Lemnos
aludis diversaj antikvaj verkistoj
al kiuj ĝi estis miraĵo neklarigebla . . .
Oni sciis tute bone ke ĝi ne havis originon
vulkanan
kaj oni adoris la misteraĵon kiel
Dion
samkiel dum multaj jarcentoj iaj Parsioj
adoradas kiel Dion
la fajrokolonojn
sur la grandaj petrolkampoj en Baku . . ."
„. . . kaj la ŝlosiloj al ĉiuj ĝiaj ĉefaj institucioj
estas troveblaj antaŭ Sargono Unua".

**sion* el refl. pron. *si*

Isaac Asimov

LA UNUA LEĜO

Rigardis Miĉjo Donovano sian malplenan bierkruĉon, spertis enuon, kaj decidis, ke li jam sufiĉe aŭskultadis. Li diris, laŭte, „Se temas paroli pri neordinaraj robotoj, mi foje konis roboton, kiu malobeis la Unuan Leĝon."

Kaj pro la fakto, ke tio estas nepre neebla, ĉiuj ĉesis paroli kaj sin turnis por rigardi Donovanon.

Tuj bedaŭris Donovano pri sia babilemo kaj elektis novan temon. „Hieraŭ mi aŭdis belan ŝercon," li diris konversacie, „pri..."

Makfarlano, kiu sidis apud Donovano, diris: „Vi volas diri, ke roboton vi konis, kiu malutilis homon?" Tio signifis, kompreneble, malobeon al la Unua Leĝo.

„Iele-iome" diris Donovano. „Nu jes, mi aŭdis ŝercon pri..."

„Rakontu tion!" ordonis Makfarlano. Pluraj aliaj batis la tablon per siaj bierkruĉoj.

Donovano faris laŭdevige. „Tio okazis sur Titano antaŭ proksimume dek jaroj," li diris, pensante rapide. „Jes, tio estis en la jaro dudekkvin. Ni antaŭnelonge estis ricevintaj ekspedaĵon de tri novmodelaj robotoj, speciale kreitaj por Titano. Ili estis la unuaj el la marko MA. Ilin ni nomis Moa Unu, Du kaj Tri." Li klakigis siajn fingrojn mende novan bieron kaj postrigardis seriozmiene la kelneron. Nu, kio poste?

Makfarlano diris: „Mi pasigis duonon de mia vivo en la robota fako, Miĉjo. Neniam mi aŭdis pri serio MA."

„Pro tio, ke oni ĉesigis konstruadon de la Moaoj tuj post... post tio, pri kiu mi estas rakontonta. Ĉu vi ne memoras?"

„Ne."

Donovano daŭrigis rapideme. „La robotojn ni tuj laborigis. Komprenu, la Kontrolejo ĝis tiam estis tute senfunkcia dum la ŝtormsezono, kiu daŭras dum okdek pocento de la Titana turniĝo ĉirkaŭ Saturnon. Dum la teruraj neĝoj oni ne povis trovi la Kontrolejon, eĉ se ĝi estus cent metrojn for. Ne utilas kompasoj, ĉar mankas al Titano magneta forto.

La specialaĵo, tamen, de tiuj robotoj MA estis, ke ili havis vibrodetektilojn novelpensitajn, tiel ke ili kapablis aliri rekte la Kontrolejon tra ĉio ajn, kaj tio signifis, ke la minado jam fariĝis ebla dum la tuta ĉirkaŭiro. Kaj ne interrompu, Mak. Oni nuligis ankaŭ la vibro-detektilojn, kaj pro tio vi ne aŭdis pri ili." Donovano tusis. „Armea sekreto, vi komprenas."

Li daŭrigis. „La robotoj bonege laboris dum la unua ŝtormsezono, sed poste, komence de la trankvila sezono, Moa Du komencis agi devie. Ŝi daŭre forvagadis en angulojn kaj sub pakegojn, kaj oni devis logi-persvadi ŝin reveni. Fine ŝi tute forlasis la Kontrolejon kaj ne revenis. Ni decidis, ke ŝia konstruado estis malperfekta, kaj ni persistadis per la du ceteraj. Tamen, tio signifis, ke ne sufiĉis nia laborforto, almenaŭ nia robotforto, do kiam proksimiĝis la fino de la trankvila sezono kaj iu devis iri ĝis Kornsk, mi proponis min por riski la vojaĝon senrobote. Tio ŝajnis sufiĉe sendanĝera; la ŝtormoj ne estis atenditaj ĝis post du tagoj kaj mi revenus post maksimume dudek horoj.

Mi estis revenanta — almenaŭ dek mejlojn de la Kontrolejo —, kiam la vento ekblovis kaj la aero ekdensiĝis. Mi tuj surterigis mian flugveturilon por ke la vento ne frakasu ĝin, direktis min al la Kontrolejo kaj komencis kuradi. Mi bone kapablis kuri tiun distancon en la malforta gravito, sed ĉu mi kapablis kuradi rekte? Jen la demando. Mia aerprovizo estis sufiĉa kaj la varmigaj bobenoj de mia vestaĵo estis en ordo, sed dek mejloj en Titana ŝtormo egalas infiniton.

Poste, kiam la neĝfluado jam mallume, gluece krepuskigis ĉion, kaj eĉ Saturno estis malheligita kaj la suno estis nur pala pustuleto, mi abrupte haltis kaj apogis min al la vento. Antaŭ mi staris malhelajeto. Tio estis ŝtormhundido; la sola vivantajo, kiu kapablas travivi Titanan ŝtormon, kaj la plej atakema vivantajo ie ajn. Mi sciis, ke mia spacvestajo ne protektos min, kiam ĝi min ekatakos, kaj pro la mallumeco mi devis atendi ĝis ĝi estos tutproksima, alie mi ne riskus pafi. Unu maltrafo, kaj ĝi atingus min.

Malrapide mi retroiris kaj la ombrajo min sekvis. Kaj nun aperis Moa Du, la mankiua roboto. Tute ne venis al mi en la kapon scivoli, kio al ĝi okazis, aŭ kial ĝi okazis. Mi nur kriegis: „Moa kara, kaptu tiun ŝtormhundidon; kaj poste rekonduku min ĝis la Kontrolejo!"

Ĝi nur rigardis min, kvazaŭ ĝi aŭdis nenion, kaj alvokis; „Mastro, ne pafu! Ne pafu!"

Ĝi sin direktis al tiu ŝtormhundido kuregante.

„Kaptu tiun hundidaĉon, Moa!" mi kriis. Nu jes, ĝi kaptis la hundidon. Ĝi levis ĝin kaj *daŭrigis la kuradon.* Mi kriegis ĝis mi estis raŭka sed ĝi neniam revenis. Ĝi lasis min en la ŝtormo mortontan."

Paŭzis Donovano dramece: „Kompreneble, vi konas la Unuan Leĝon: *Roboto ne povas malutili al homo, aŭ per neagado permesi, ke homo difektiĝu!* Nu, Moa Du simple forkuris kun tiu ŝtormhundido kaj lasis min mortontan. Ĝi malobeis la Unuan Leĝon.

Feliĉe, mi travivis. Post duonhoro la ŝtormo malfortiĝis. Mi rapidegis ĝis la Kontrolejo kaj la postan tagon efektive komenciĝis la ŝtormoj. Moa Du revenis du horojn post mi, kaj, kompreneble, klariĝis tiam la mistero kaj la MA-modelojn oni tuj nuligis."

„Kaj precize kio estis la klarigo?" demandis Makfarlano.

Donovano lin rigardis seriozmiene. „Estas vere, ke mi estis homo mortminacata, Mako, sed al tiu roboto io pli gravis, eĉ ol mi, ol la Unua Leĝo. Ne forgesu, ke tiuj robotoj apartenis al la serio MA kaj tiu aparta MA-roboto serĉadis privatajn angulojn dum kelka tempo antaŭ ol ĝi malaperis. Kvazaŭ ĝi atendis, ke okazos al ĝi io speciala kaj privata. Ŝajnas, ke io speciala efektive okazis."

Donovano suprenturnis pie siajn okulojn, kaj tremis lia voĉo. „Tiu ŝtormhundido ne estis ŝtormhundido. Ni nomis ĝin Moaido, kiam Moa Du reportis ĝin. Moa Du *devis* ĝin protekti kontraŭ mia armilo. Kio estas eĉ la Unua Leĝo, kompare kun la sankta ligateco de la patrina amo?" El la angla: W. *Auld.*

Sándor Szathmári

Leciono de historio

– Fragmento el la romano „Vojaĝo al Kazohinio"–

(La romano de Sándor Szathmári (1897—1974) Vojaĝo al Kazohinio[1] (eld. SAT, 1958) estas priskribo de nova vojaĝo de la Swift-a figuro, Gulivero. Post ŝiprompiĝo li trovas sin en la lando de la hinoj, tiuj ĉi perfektaj estaĵoj, kiuj tamen formis sian mondon tro „senanima" laŭ lia opinio. Fine li atingas, ke la hinoj *sendas lin al la teritorio de la* behinoj *— estaĵoj, kiuj simile al Gulivero ne kapablis vivi laŭ la hina normaro. Gulivero, kiu ĉe la hinoj trovis la vivon senkolore logika, inter la behinoj spertas sufiĉe da mallogikaĵoj. En la suba fragmento li rakontas pri sia vizito en behina lernejo, kie li aŭskultas prelegon pri historio. La aŭtoro ĉi tie tenas kvazaŭ kurban spegulon antaŭ nin mem, ja la historioprezento de la behina preleganto ne estas tute fremda por ni. El la nekonataj vortoj, kiujn la aŭtoro uzas simbole, sence gravas nur* proko, *kiu signifas „instruisto". La ceterajn ĉiu leganto povas anstataŭigi laŭ la historio de la propra lando...)*

Kaj li *(la instruisto — Red.)* rakontis longan historion pri la estinto de la behinoj, kiun mi konigas nur skize al la Leganto.

Li rakontis, ke la estinto de la behinoj dividiĝas en tri ĉefajn epokojn: komence estis la primitiva aŭ kruela epoko, poste venis la transira, aŭ duonkruela epoko, kaj poste sekvis la hodiaŭa, aŭ perfekta epoko.

Antaŭ longaj jarcentoj, dum la primitiva aŭ kruela epoko, la *butukoj* tiranis, trompis kaj rabadis la popolon. De la kolo de la butukoj pendis sur ŝnuro malantaŭe granda huffero kaj la popolo ne nur ne mortbatis, sed eĉ estimis ilin. (Ĉe tiuj vortoj la infanoj laŭte ekridis.) La *belki* tiam okazis tiel, ke la homoj ĉe renkonto ŝovis sian fingron en la orelon de la alia, (la infanoj ridis eĉ pli laŭte), kaj ili rigardis *kipu,* se oni kudris diversajn flikojn sur la teksaĵon (la infanoj ŝanceliĝis pro ridego).

Sed sekvis certa behino, nomita Zeĉeĉe, kiu nomis la butukojn malnoblaj ĉarlatanoj, la *ketnion* kaj kipuon trompaĵo kaj manio. Li deklaris, ke la putrinta reĝimo de la butukoj devas esti detruota kaj li postulis la reĝimon de la racio.

La butukoj lin ekkaptis kaj senhaŭtigis vivantan. Sed Zeĉeĉe jam havis multajn adeptojn, kaj dum kvindek jaroj verŝiĝis la sango. Fine la zeĉeĉistoj forigis la butukojn kaj transprenis la regadon de la behinoj. Nun komenciĝis la transira, aŭ duonkruela epoko.

Sed la paco ne longe daŭris, ĉar la novaj registoj, kiuj nomis sin *batakoj,* same komencis turmenti kaj tirani la popolon, kiel la butukoj. Ili forprenis ĉion kaj nenion donis al la popolo. Desur iliaj zonoj pendis sur drato granda plumbopeco, kaj la popolo ne[2] nur ne mortbatis, sed eĉ estimis ilin. (La infanoj ĉe tiuj vortoj preskaŭ eksplodis de la ridego). La belki estis, ke la homoj gratis la genuojn unu de la alia, kaj se iu ŝmiris sur la tolaĵon diverskolorajn malpuraĵojn, tiu nomiĝis kipu. (La infanoj jam ruliĝis sur la tero).

Kaj tiam venis Zaĉaĉa la granda, kiu nomis la batakojn ĉarlatanoj, pri la ketni kaj kipu kuraĝe deklaris, ke ĝi estas trompaĵo kaj manio kaj postulis la reĝimon de la racio.

Zaĉaĉa estis kaptita de la batakoj, lia ventro estis distranĉita, liajn intestojn dumvive eltiritajn oni ĵetis al la hundoj, kaj poste liaj adeptoj estis ekstermataj per la plej sagaca krueleco. (Ĉe tiuj vortoj la infanoj ekploris).

Sed la adeptoj de Zaĉaĉa pli kaj pli multiĝis, sekvis sesdekjara sanginundo, dum kiu plurajn batakojn oni kaptis, poste ilin kunligis, iliajn dentojn unuope elrompis, iliajn langojn elbruligis, kaj poste ili estis laŭlonge trapikitaj per stango. (La infanoj saltante aplaŭdis kaj ĝojis).

Kaj fine la zaĉaĉistoj venkis. Ĉi tie komenciĝas la hodiaŭa, aŭ perfekta epoko, dum kiu la regadon faras la *elak betikoj,* de sur kies genuoj pendas honorindaj *bilevoj,* kiuj per sia prudento certigas la reĝimon de la racio. Kaj de tiam ĉiu ricevas el la flavaj ŝtoneroj, ĉu betiko, *beratnu,* proko, ĉu nur simpla akvumisto aŭ *skoro*-infano. (La infanoj saltante *vakeis).*

Li parolis ankaŭ pri certa Zuĉuĉu, kiu hodiaŭ forte agitas kontraŭ la ordo kaj trankvilo: li aŭdacas nomi la honorindajn betikojn fariseaj poŝŝtelistoj, li ribeligas kontraŭ la perfekta ketni kaj kipu, li postulas, ke oni dornplenigu ne la seĝon, sed la ŝrankon, ke la belki okazu per la ektiro de la orellobo kaj la registara potenco estu transdonita al la *bitekoj,* kaj ĉion ĉi li faras en la nomo de la racio, kvankam estas evidente, ke tiajn aferojn povas aserti nur freneziĝintaj furiozuloj, kiuj pli-malpli frue gajnos sian indan punon. (La infanoj abomenis, kaj skuante la pugnon ili postulis elbruligi la okulojn de Zuĉuĉu.)

Mi povas aserti, ke eĉ la plej ekstrema fantazio de Grand Guignol ne elpensis ankoraŭ pli abomenan terurdramon ol tiu, kiun ĉi tiuj rabiuloj reale efektivigis. Kaj anstataŭ kraĉinte pro memnaŭzo en la tubon de revolvero, pafi al si en la kapon, ili eĉ ĝojis, ke ili ĉion ĉi faris kaj ke ili sukcesis ĝin elbatali. (Kion elbatali? Neniu sciis, ili nur diris: la perfektan epokon.)

---

[1] *320 paĝoj, broŝurita, 6,90 ned. gld. Mendu ĉe UEA.*

[2] *Foresto de tiu ĉi vorto en la libro estas evidenta preseraro. (Red.)*

Jorge Luis Borges

La domo de Asteriono

Kaj la reĝino naskis filon nomatan Asteriono.

Apolodoro: Bibliotheca, III., I.

Mi scias, oni min akuzas pri fiereco, kaj eble pri mizantropio, kaj eble pri frenezeco. Tiaj akuzadoj (venĝotaj de mi siatempe) estas mokindaj. Vere, mi ne eliras el mia domo, sed ankaŭ estas vere, ke ĝiaj pordoj (kies nombro estas senfina)[1] malfermitaj estas tagenokte antaŭ la homoj, eĉ antaŭ la bestoj. Eniru do, kiu volas. Li ne trovos virinan pompon ĉi tie, nek grandiozajn instalaĵojn uzatajn ene de palacoj, sed jes la kvietecon kaj la solecon. Tiel la eniranto trovas domon, netroveblan alian surface de la tero. (Ĉiuj mensogas, kiuj asertas, ke en Egiptio ekzistas io simila.) Eĉ kiuj kalumniadas min, rekonas, ke estas *nek unu meblo* en la domo. Alia ridindaĵo, ke laŭ ili mi, Asteriono, vivas tie kvazaŭ en prizono. Ĉu mi ripetu, ke eĉ unu pordo ne estas fermita, ĉu mi aldonu, ke ekzistas neniu seruro? Cetere, iun krepuskon mi eliris sur la straton; se mi revenis antaŭ la nokto, mi faris tion pro timo inspirita en mi de la vizaĝoj de l'plebo, vizaĝoj senkoloraj kaj plataj, kvazaŭ la malfermita mano. La suno jam subiris, sed iu infana, senhelpa ploro kaj la kruda petegado de l'grego atestis, ke oni rekonis min. La popolo preĝadis, forkuris, sin terenĵetis; aliaj suprengrimpis la klaŭstron de la templo de l'Torĉoj, aliaj arigis ŝtonojn. Iu, mi kredas, kaŝiĝis sub la maro. Mia patrino ne vane estis reĝino; mi ne kapablas intermiksiĝi kun la vulgaruloj, kvankam tion pretendus mia modesteco.

Jen la fakto: mi estas ununura. Ne interesas min, kion homo al homo kapablas transmisii; kiel la filozofo, mi pensas, ke nenio estas komunikebla pere de l'skribarto. La tedaj kaj trivialaj bagateloj ne povas enhaviĝi en mian spiriton, kapabligita por la grandeco; mi neniam encerbigis la diferencon inter tiu kaj alia litero. Certa grandanima malpacienco impedis, ke mi ellernu legi. Kelkfoje mi bedaŭras tion, ĉar la noktoj kaj la tagoj estas longaj.

Tamen ne mankas al mi amuziĝoj. Kvazaŭ atakonta ŝafo, mi kuradas laŭ la ŝtonaj galerioj ĝis kiam mi terenfalas, vertiĝinte. Mi kaŝiĝas en ombro de iu akvujo aŭ en iu koridorflekso, kaj mi ludas, ke oni serĉas min. Estas terasoj, de kiuj mi defaligas min, ĝis kiam min kovras sango. Je kiu ajn horo mi povas ludi la dormanton, fermante la okulojn kaj profunde spirante. (Kelkfoje vere mi ekdormas, kelkfoje ŝanĝis koloron la tago, kiam mi malfermas la okulojn.) Sed el tiom da ludoj, kiun mi preferas, estas tiu de alia Asteriono. Mi ŝajnigas, ke li venas por viziti min, kaj mi montras al li la domon. Respekteme kliniĝante mi diras al li: *Nun ni reiras al la alia vojkruciĝo* aŭ *Nun ni eniras en alian korton* aŭ *Trafe mi diris, ke plaĉos al vi la rivereto de l'kanalo* aŭ *Nun vi ekvidos akvujon plenplenan de sablo* aŭ *Vi ekvidos, kiel forkiĝas la kelo.* Kelkfoje mi eraras, tiam ni ambaŭ ekridas bonhumore.

Ne nur tiujn ludojn mi inventis, sed mi ankaŭ meditadis pri la domo. Ĉiuj partoj de l'domo multfoje ekzistas, kiu ajn loko estas alia loko. Ne estas unu akvujo, unu korto, unu trinkujo, unu manĝujo; estas dekkvar (senfinaj) la manĝujoj, la trinkujoj, la kortoj, la akvujoj. La domo estas tiel granda, kiel la mondo; pli ĝuste, ĝi estas la mondo mem. Tamen, per multe da penado, tra kortoj kun akvujo kaj polvoplenaj galerioj el griza ŝtono, mi atingis la straton, kaj ekvidis la templon de l'Torĉoj kaj la maron. Tion mi tute ne komprenis, ĝis kiam ia nokta vizio malkaŝis al mi, ke dekkvar (senfinaj) estas ankaŭ la maroj kaj temploj. Ĉio estas multfoja, dekkvarfoja, sed du aĵoj estas en la mondo, kiuj ŝajnas esti unufojaj: supre, la hirta suno; sube, Asteriono. Eble estis mi, kiu kreis la stelojn kaj la sunon kaj la grandegan domon, sed pri tio mi jam ne rememoras.

En ĉiu naŭa jaro envenas en la domon naŭ homoj, por ke mi liberigu ilin de ĉiu malbono. Mi aŭdas iliajn paŝojn aŭ iliajn voĉojn funde de la ŝtonaj galerioj, kaj gaje mi ekkuras por trovi ilin. La ceremonio daŭras kelkajn minutojn. Unu post alia ili terenfalas, sen ke miaj manoj estus sangmakulitaj. Ili restas tie, kie defalis, tiel la kadavroj helpas distingi unu galerion de la alia. Mi ne scias, kiuj estas ili, sed scias, ke unu el ili profetis, je sia mortohoro, ke iam alvenos mia savisto. Ekde tiam ne doloras min la soleco, sciante ke vivas mia savisto, kaj finfine li leviĝos el la polvo. Se miaj oreloj perceptus ĉiujn bruojn de l'mondo, mi ekkonus liajn paŝojn. Estu tiel, ke li portus min al ia loko havanta malpli da galerioj kaj malpli da pordoj. Kiel aspektos mia savisto? — mi demandas min mem. Ĉu taŭro, ĉu homo li estos? Ĉu eble li estos homvizaĝa taŭro? Aŭ ĉu tia, kia mi estas?

La matena suno reflektiĝis sur la bronza spado. Jam restis neniu spuro de sango.

— Ĉu vi kredas, Ariadna? — diris Teseo. — La minotaŭro apenaŭ sin defendis.

El hispana tradukis:

Zsuzsa *Varga—Haszonits*

---

[1]*En la originalo ni legas dekkvar, sed multas kaŭzoj por konkludi ke, surbuŝe de Asteriono, tiu numeralo signifas senfina.*

Konisi Gaku

La kosmo-elmigrado

Tra la nigra, senfina kosmospaco nun lumsage rapidas nia kosmoŝipo Kolumbo n-ro 5. Jam pasis preskaŭ dek jaroj de kiam ni forlasis la terglobon; profunda laco kaj enuo aperas sur la vizaĝoj de la veturantoj. Sed nun la fotonraketa motoro funkcias plenbremse.

„Jen, tiu stelo, la celita! Nur dek tagojn plu, kaj ni fine atingos ĝin. Kuraĝon, kolegoj!" — kriis mi, la ĉefo de la ekspedicio. Sur la televida braŭntubo briletas helflava lumpunkto, kiu tagon post tago grandiĝas.

„Ni povas distingi, jen, la planedon. Ke ĝi estu loĝebla astro!"

La ekspedicianoj preĝe rigardis la pinglopintan lumon apud la patrinstelo. Esplori, ĉu tiu planedo taŭgas por homa vivado aŭ ne, tio estas la gravega tasko de tiu kosmoekspedicio.

Jam de jarcentoj daŭras paco sur la terglobo. Sciencoj kaj diversaj teknikoj mirinde progresis. Kvankam ankoraŭ ne realiĝis la pralonga deziro, la senmorteco, la terglobanoj nun ĝuas multe pli longan vivon ol iam antaŭe. Kaj disvolviĝo de la artefarita utero definitive liberigis la virinojn for de la turmentaj naskodoloroj. Nature, ĉiam akcelita kreskadas la nombro de la terglobanoj; la planedo komencis malvastiĝi per terura rapideco. La kultivitaj kampoj kaj la montara verdaĵo estas foreroziitaj de la ŝvelantaj loĝkvartaloj. Serioza krizo de manĝoprovizado ekminacas la homaron. Se tia stato daŭros ankoraŭ plu, estas evidente, ke baldaŭ venos neevitebla katastrofo. Oni intencis koloniigon de la luno, Marso aŭ Venuso, la najbaraj planedoj, sed ili ĉiuj pruviĝis maltaŭgaj: la severaj medioj postulis tro grandan elspezon por produkti tie komfortajn vivkondiĉojn. Restis nur unu rimedo: elmigri ekster la sunan sistemon. Mi estis fervora insistanto de tiu ideo. Esploraj ekspedicioj estis organizitaj, kaj sep Kolumbo-raketoj estis lanĉitaj unu post alia cele al ŝajne esperdonaj steloj. La stelon, al kiu nun flugas Kolumbo n-ro 5, mi forte rekomendis kiel plej fidindan kandidaton, kaj mem povis fariĝi la ĉefo de tiu ekspedicio.

Kolumbo n-ro 5 jam proksimiĝis al la celita planedo. La globforma astro, nebule blueca, jam kovras tri kvaronojn de la braŭntubo. Kio atendas nin tie, ĉu fekunda paradizo aŭ infera dezerto? La kolegoj ne enuis diskutante pri tio, sed mi havis firman konvinkon.

Kun atenta zorgemo la raketo ĉirkaŭflugis la planedon, dume kolektante ĉiajn informojn fizikajn, biologiajn, geografiajn ktp.

„Temperaturo modera. Ekzistas aero kaj akvo, eĉ abunde!"

„Ankaŭ vegetaloj bone kreskas. Ŝajne mankas altagradaj animaloj, sed post ĉio ĝi estas certe loĝebla."

„Hura! Savita estas la homaro!"

Kun kontento mi rigardis la ekscitiĝon de miaj anoj. Akompanate de iliaj jubiloj, la raketo alvenis. Forgesinte la akumulitan lacon, ili tuj komencis pluajn esplorojn. La atmosfero konsistas el oksigeno, nitrogeno, akva vaporo kaj aliaj, kun proporcio preskaŭ sama kiel tiu sur la terglobo. La suno — la patrinstelo — sendas sufiĉe abundajn lumradiojn. En adekvate salita marakvo naĝas diversformaj fiŝoj; inter densaj foliaroj de praarbaro flugas kun pepoj bluaj kaj brunaj birdetoj; sur vasta ebeno disfloras ĉarme belaj floroj, kiujn flugilhavaj insektoj zume vizitadas... Mirinde, ĉio estas draste simila al la estaĵoj terglobaj.

„Dio! Providenco! Kvazaŭ estas preparite por ni!"

„Ĉu ne, ke la Dio kompatema degnis aranĝi ĉion ĉi por la suferanta homaro?"

„Ne estas tiel mirinde", aplombe komentis alia, fizikisto, „la naturaj cirkonstancoj ĉi tie tre similas al tiuj sur la terglobo; el similaj kondiĉoj ĉiam sekvas similaj rezultatoj. Jen ĉio ĉu ne?"

„Vi pravas. Tamen, tio estas bela spektaklo", entuziasmis botanikisto. „Efektive estas nenia grava diferenco inter la flaŭroj ĉi-tiea kaj tergloba, kvankam relative multaj estas tiuj similaj al dioneo.[1]

„Post ĉio, mi admiras la antaŭvidivon de nia ĉefo!"

„Restas tamen demando: Kial do ni ne vidas homon aŭ ion similan?"

„Finfine ne ĉio estas la sama, kompreneble."

„Hej! Venu al mi! Kio estas tio?", kriis iu, kiu ĉasadis buntan papilieton sur la herbejo. Ĉiuj kuris al la voĉo: tie kuŝas io simila al detruita grandega kosmoveturilo.

„Ruino de raketo, verŝajne. Kredeble vivuloj el alia astro intencis veni al tiu ĉi planedo, sed iel malsukcesis ĉe la alveno."

Kelkaj similaj ruinoj troviĝis ankaŭ en aliaj lokoj.

„Ba, tiom da fuŝuloj!", mi grimacis. „Ni eĉ ne supozus pri tia fiasko! La terglobanoj rajtas fieri pri sia teknika nivelo, ĉu ne? Nu, kolegoj, la esplorado jam sufiĉas. Ni jam rapidu raporti al la terglobo, oni senpacience atendas ĝin."

Ĉar oni trovis nenian simptomon de minaco kontraŭ la homa vivo, mi ordonis, ke la raporto enhavu la konsilon: „Tute malnecesaj estas armiloj. Prefere kunportu objektojn kun pli da kultura valoro."

Elektraj ondoj kuris tra la kosmospaco portante sur si la ĝojigan raporton.

La tuta terglobo eksplodis pro ĝojo, kiel radiofonie informis nin la Elmigrada Centro. El la sep Kolumbo-raketoj jam du raportis negative, kaj pri la kvar aliaj oni eĉ ne sciis, ĉu ili ankoraŭ bone fartas aŭ ne. N-ro 5 estis do la lasta unusola espero, kaj ĝia sukceso estis des pli sensacia.

La terglobanoj nomis la planedon „la Novtero", la Mondfedera Registaro tuj komencis konstrui gigantajn kosmoŝipojn nomatajn „kosmoarkeoj", kaj varbi volontulojn por la elmigrado — la „noaidojn". La amaskomunika sistemo plenefike bruis por boligi la atmosferon. Ĵurnaloj konkure priskribis, laŭ la plumoj de plej eminentaj sciencistoj, la paradizajn cirkonstancojn de la malproksima planedo. Radio- kaj televidstacioj entuziasme dissendis popularajn kantojn: jen „Marŝu, Noaidoj!", jen „La Valso Fotonraketa". Melodrama filmo „Romanco trans Konstelacioj" ĝuis furoran sukceson. Virinoj, kun brilantaj okuloj kaj malsata stomako, spektis fasonparadon de „la novtera modo", en kiu manekenoj montris sin, ekzemple, en delfensimila kostumo kun ringforma anteno sur la kapo, ktp., ktp. ... Ĉiuj tiuj informoj amuzis min kaj la aliajn ekspedicianojn, ne sen tikla memfieremo.

Post du jaroj da tempo kaj senrezerva koncentrado de la tuta kapablo de la tergloba homaro, fine pretiĝis la preparo por la grandio-

---

[1] *dioneo:* muŝkaptulo *(Dionea muscipula)*, insektokaptanta kaj manĝanta herbo, kies folio kunfaldiĝas, kiam insekto ĝin tuŝas kaj algluiĝas

za kosmoelmigrado. Venis informo, ke grandega eskadro de la kosmoarkeoj eknavigis por dekjara veturado cele al la Novtero. Survoje ili ricevos mian gratulan radiogramon: „Rekte antaŭen! Ĉio iras bone ĉi tie. Kolumbo n-ro 5."

„Mi vidas! Mi vidas! Jen, tie!", kriegis unu ekspediciano. Tie, kien lia levita mano streĉe sagmontras, jen briletas aro da arĝentaj lumpunktoj — la kosmoarkeoj el la terglobo, finfine alvenintaj. Post momento la tuta ekspedicio estis renversita abelkorbo. Ĉiuj alkuris kun iaj nekompreneblaj krioj, kaj fiksis flamantan rigardon al la ĉielangulo. Malgraŭvole ili eksentis tiun dolĉamaran doloreton ĉe sia nazradiko, sed kun vizaĝo larme kaj ride ĉifita ili disŝire svingis la manojn kaj plengorĝe alvokis en la ĉiellazuron.

„He-e-e-ej! Bon-vee-noon!"

„Ja ho! Ĉu ... vi ... vidas ... nin, gefratoj?"

Iuj dance ĉirkaŭsaltas, aliaj rulas sin surtere, ĉiuj kun plorridoj, kiujn ili vane penis subpremi.

„Fine, fine, fine! Fine ili venas!"

Forestas iom el la mensa ekvilibro. Ja tre povas esti. Estis longega tempo: la homoj, kiuj estis ankoraŭ dudekkvin- ĝis tridekjaraj ĉe la ekveturo el la terglobo, nun portas grizan aŭ tute maldensan hararon. La nova generacio, naskita dum la veturado jam elkreskis adoleska kaj bone laboras helpante aŭ anstataŭante la malnovan. Kaj nur por tiu ĉi tago ili ĉiuj pacience travivis kaj laboradis ĝis nun. Mi ne povis rifuzi, ke ia kompatemo sin levas en mia koro. Sed ankaŭ mi mem ja avide atendegis la alvenon de tiu ĉi tago.

La arkeoj komencis alvenadi. Unu post la alia, ŝprucante palblankan flamon, ili venis malsupren. Surdige tondris la eksplodbruoj.

La elmigrantoj konkure elsaltis kvazaŭ svarmantaj akridoj. Ili plenbruste enspiris la freŝan bongustan aeron, regalis la okulojn per la kreskantaj verdaĵoj, kaj ĝuis la intiman aromon de la nigra tero. Ĉion ĉi oni ne povis frandi en la arkeoj.

Okazis bankedo, kiun la ekspedicianoj aranĝis por la estraro de la kosmoarkeoj. La ĉefo de la elmigrantaro ekstaris por saluti:

„Estimataj gefratoj! Antaŭ cio, reprezentante la tutan elmigrantaron, mi esprimas mian elkoran dankon pro la grandegaj penoj ĝis nun oferitaj de la heroaj ekspedicianoj. La grandioza elmigrado estas ĵus finita en bela sukceso. Gratulinde. Sed ni devas scii, ke tio estas la komenco de la multe pli grandaj malfacilaĵoj. Nu, mi proponas tosti por la brila prospero de nia nova mondo! Vivu la Novtero!"



Ilustraĵo el la revuo „Galaktika"

„Vivu la Novtero!"

Sekvis entuziasmaj aplaŭdoj, dum li firme manprenis kun mi.

La ekspedicio finis ĉiujn siajn taskojn per la transdono de la abundaj materialoj, kiujn ĝi kolektis depost la alveno. La anoj ĉiuj foriris al la gratula festivalo por ĝui filmon, koncerton, balon ktp. Sed por mi restas ankoraŭ unu afero por plenumi. Mi ŝtele eltiris min el la ekspedicia bazo kaj iris al proksima arbaro. Tie, apud muskokovrita roko troviĝas mia sekreta oficloko, kiun mi ofte vizitis nokte, dum la aliaj dormis enlite.

Mi zorgeme forbalais defalintajn foliojn, el sub kiuj aperis malgranda teleparolilo.

„Ha-lo! Parolas 274 891", mi anoncis min per mia vera nomo.

„Ha-lo! Kiel iras la afero?" demandis voĉo el la alia ekstremo de la drato, kiu etendiĝas profunden sub la teron.

„Tute glate. Ili nur ĝojegas kaj jubile festivalas. Iam ajn ni povos komenci."

„Bone. Post duonhoro ni estos pretaj. Vi revenu al ni, antaŭ ol ni komencos."

„Konsentite."

Mi malŝaltis la parolilon. Ĝojo rapide disvastiĝis tra mia korpo: mi sukcese plenumis la gravan taskon elmigrigi la tergloban homaron al tiu ĉi planedo.

Krakis du-tri fajraĵoj en la ĉielo: la festivalo ŝajnas esti en sia kulmino. Ĉu ĝi povos daŭri ĝis la fino, mi dubas. Post duonhoro la senarmaj terglobanoj ricevos bone preparitan agreson. Eĉ bataleto ne okazos; ili ĉiuj estos facile kaptitaj de la indiĝenaj vivuloj, kiuj loĝas profunde sub la tero.

Tiamaniere, allogite de la paradizaj vivkondiĉoj de tiu ĉi planedo, jam alvenis diversaj vivularoj el aliaj astroj, nur por esti kaptitaj de la indiĝenoj. Kapablaj almenaŭ fari la kosmovojaĝon, ili posedas plimalpli altnivelan civilizacion. Ankaŭ la vivuloj mem povas esti sufiĉe bonkvalitaj kiel dombestoj. Dank' al tiu drasta entrepreno la vivnivelo kaj la civilizacio sur tiu ĉi planedo multe progresis. Inter la ĝis nun kaptitaj, laŭ mia prijuĝo, la terglobа homaro apartenas al la supra klaso de la mezgrada kvalito.

Mi puŝis kaŝitan butonon sur la apuda roko; enirejo al la lifto sin malfermis. Dek minutoj sufiĉos atingi la fundon, la enirejon al la subtera regno. Tie speciala re-forma maŝino liberigos min de la plumpa terglobana aspekto, kaj mi reakiros tiun elegantan korpon de indiĝeno: kun kvar brakoj kaj ses okuloj.

Krakis ankoraŭ unu fajraĵo. Blovetis zefiro super la disflorantaj dioneoj.

Vladlen Bahnov

AL LA STELOJ

La kosmoŝipo havanta la fieran nomon *Avanulo de Kosmo*, per konsterna rapideco proksimiĝis al la asignita celo. Entute restis jam nur kvin jaroj da vojaĝo ĝis la planedo, kies nomo — ĝi nomiĝis J2-2N-39 — jam en si mem estis iele alloga.

La elektronikaj pilotoj direktitaj per elektronika cerbo, sekure regis la kosmoŝipon ŝtopitan plenplene per diversaj elektronikaj aĵoj. La ŝipanaro dume — lulita de elektronikaj hipnot-aparatoj en kelkmonatan dormon — pace dormis en la hipnotejo.

La zorgemaj robotoj po unu fojon semajne returnis la dormantojn de unu al la alia flanko, kaj piedpinte ili ŝteliris en la akumulatorejon por postŝargo.

Fli frue la hipnotaparatoj devis prezenti ankaŭ diversajn amuzajn sonĝojn, sed foje la kosmonaŭtoj venis al tiu konkludo, ke rigardi tiaspecajn sonĝojn — estas nur tempoperdo. Dum oni rigardas tiujn, kvazaŭ estus interese, sed post la vekiĝo oni havas nenion paroli pri ili.

Kiajn seriozajn problemojn prezentas tiuj sonĝoj?
— Neniajn! Kian instruon ili havas?
— Neniajn! Kaj — ĉar la kosmonaŭtoj plejparton de la vojaĝo pasigas en dorma stato, tiel malŝpari la valoran tempon — estas kvazaŭ peko.

Estus eble ja organizi prezentadon de scienc-popularigaj sonĝoj ekzemple el la serioj *Trezoraro de niaj muzeoj* aŭ *Atingaĵoj de la fiziko*, sed oni baldaŭ forgesas la sonĝojn.

Tiam la plej eminentaj avanuloj de la kosmoŝipo *Avanulo* decidis, ke dum la tempo de dormo ili alpropriĝas novan fakon, novajn konojn per la helpo de ultrahipnot-pedagogio, tio estas per rapidigita studmetodo, aplikata en dorma stato. Tiel, dum la kosmonaŭtoj dormis, la elektronikaj instruiloj flustris al ili en la orelojn la lecionojn. Kaj ili se iam ajn vekiĝis, kun ĝojo povis konstati, ke ili posedas aron de konoj, kiujn ili eĉ ne konjektis antaŭ dormo.

Ĉiu lernis tion, por kio li ekhavis emon.

La ĉefkuiristo ekzemple dediĉis sian sonĝon por la studado de poezio, (ekde la antikvaj poemoj, kies aŭtorojn neniu konis, ĝis la plej modernaj poetoj, kies poemojn nun konas neniu), kaj kiam li vekiĝis, li parolis nur en versoj.

Cetere la scio akirita per la ultrahipnot-pedagogio tre efike gravuriĝis en la memoron de la kosmonaŭtoj. Ekzemple al la astrobiologo, kiu pro interesiĝo pri sporto finlernis la Tutmondan Enciklopedion kun ties ĉiuj ortografiaj kaj aliaj eraroj — kostis longan pluan dormon, ĝis li relernis ĉion ĝuste.

Verŝajne estis iu kontakto inter la rapideco de la en spaco flugeganta kosmoŝipo kaj inter tiu rapideco, kiun atingis la dormantaj homoj en la alproprigo de sciencoj. Ili per nekredebla, kvazaŭ per kosma rapideco ekposedis la plej diversajn sciencojn. Apenaŭ iu ekdormetis — post la vekiĝo li tuj bonege parolis angle.

La ĉefmeĥanikisto, kiu eĉ sen forlaso de sia lito finstudis la violonfakon de Muzika Akademio, tuj, post kiam li vekiĝis kaj la unuan fojon en sia vivo li prenis arĉon, jam violonludis kiel David Ojstraĥ.

La geologo dum dormo tiel profunde ellernis la molekularan fizikon, ke li eĉ ne vekiĝis ankoraŭ, sed jam faris serion da tre gravaj inventoj, per kiuj grandvalore pliriĉigante la sciencon li jam antaŭ la vekiĝo certigis senmortecon de sia nomo.

Jes, la kosmonaŭtoj dormis tiom produktive, kaj ili atingis tiom grandan koeficienton de utila aktiveco, ke la horojn, kiam ili ne dormis, ili opiniis tempo perdita.

Ju pli malmulte da aktiveco kaj des pli da dormo — jen, por tio aspiris poste la avanuloj de la ŝipanaro.

Kaj la kosmoŝipo daŭrigis la vojon al la steloj...

Tr.: M. F.

Ilustraĵo el la revuo „Galaktika"



Győző Csorba

ĈE SOJLO DE KOSMO

Scienculo nin alarmas
prelegante pri vizito:
fremdastruloj jam sin armas,
venos ili, kaj milito
tuj eksplodos intersfera,
kaj nia Tero mizera
se fine sin venki
lernis jam, ho, ve!
— devos komenci
ĉion denove.

Eble, povas esti ver',
ke kosmonaŭt' aliastra
alvenos al nia sfer',
kun murdarsenalo majstra,
por fariĝi sinjor'
pere de konkero,
kiel ĝis nuna hor'
kutime sur Tero,
eble, povas esti ver'.

Sed ja povas esti ver'
ankaŭ tio, ke ni, povraj,
mankojn de la karakter'
supozas al ili propraj,
falspentritan imagon,
ne konante la saĝon,
kiu tie vaste regas:
la viv' estas trezor', kaj
nenio ĝin superas.

Aŭ tio povas esti ankaŭ,
se hom' kaj fremdastra vivul'
haltas okul'al okul',
kaj samon vidas ili ambaŭ:
sur vizaĝ' tremas la sufer'
kaj tristo,
kaj en senvorta manier'
hom' kaj ano de fremda sfer'
kompreniĝos sen interpretisto.

Tr.: Márton *Fejes*

Gyula Fekete

Fantaziaj historioj el la jaro 2975-a



Grafikaĵo de Ferenc Sajdik, el la revuo „Galaktika"

LITSCENO

La kosmoŝipo post la plenumo de la tasko veturis reen al la direkto de la Tero kun sia dumembra personaro.

En la kajuto estis agrable varma. La konstante gardantaj instrumentoj mallaŭte susuris; ĝuste super la liton akra sunradio celtrafis tra la periskopfenestro.

La viro kuŝis sur sia flanko, lia nuda muskoloza ŝultro estis super la kovrilo.

La hararo de la virino dissterniĝis sur la kusenon. Ŝi ridetis per fermitaj okuloj.

— Kion vi ridas? — demandis la viro.

— Divenu!

Ili silentis. La virino dume plu ridetis.

— Ĉu mi diru la kialon?

— Permesite.

La virino prenis la manon de la viro, tiris sub la kovrilon kaj alĝustigis ĝin al sia varmega, nuda korpo, al sia konveksiĝinta ventro.

Ili kuŝis tiel unu apud la alia senvorte. Ankaŭ la viro ridetis.

KONATULOJ RENKONTIĜAS

Ili renkontiĝis hazarde en la antaŭhalo de la Departementa Protonenergio-centralo.

— Salut', olda knabo!

— Nu vidu! Jam de mil jaroj . . .

— Vi neniom ŝanĝiĝis. Kiel kaj kiele?

— Nenio eksterordinara. Estus bone foje jam . . .

— Telefonu. Aŭ mi serĉos vin.

— Bonege.

— Ni pribabilos ĉion detale. Foje ĉion laŭ nia plaĉo.

— Iafoje sciigu min. Mi ĉiam ajn . . .

— Nu, mi rapidas . . . ĝis!

Kaj efektive tamen ili ne serĉas unu la alian. Kaj ili ne pribabilis aferojn dum pluaj mil jaroj.

TIU HORO

La maljunulino ricevis sur la 45. etaĝo de la teritoria hospitalo dulitan apartan ĉambron, kie ŝi povis resti kune kun la malsanulo. Ŝi sukcesis aranĝi, ke entreprenu la esploron tiu specialisto, kiu jam regajnis siajn plurcent klientojn por la vivo eĉ el la tielnomata klinika morto. Oni menciis lian nomon kiel posteulo de la ĉefkuracisto de tiu hospitala sekcio.

La maljunulo kuŝis suprenapogite per kusenoj. Li spiregis spasme, sed la inkubatoron li ne toleris. Lia frunto perlis pro la ŝvitado.

Per siaj sangvejnaj okuloj li fikse rigardis supren en la nenion, sed li rigardis tiamaniere, kvazaŭ li eĉ vidus ion tie: kvazaŭ sur lian cindre-grizan vizaĝon rigidiĝus tiu ĉi vidaĵo.

Li jam ne estis konscia.

Post la inspektado la virino demandis la kuraciston kun senespera, pala tono:

— Bonvolu diri . . . Sed sincere bonvolu diri.

— Bedaŭrinde — levis siajn ŝultrojn la kuracisto. — Bedaŭrinde. Li vivos horojn . . . aŭ eble maksimume tagojn.

— Tamen oni ne povus ion . . . io ne estus ebla?

— Bedaŭrinde ne, kara sinjorino.

— Mi scias, ke iom post iom, sed . . . tiel neatendite, tiel subite . . .

— Mi farus ĉion eblan, kion oni scipovas laŭ la stato de la hodiaŭa scienco . . . Rezignaciu, kara sinjorino.

La virino ploradis ĉe la pordo, antaŭ reiro al la malsanulo, plorsnufetis, viŝadis siajn okulojn, kaj pensis pri tio, ke tio jam estas neevitebla. Post tio ŝi jam estas certa, se venos ŝia horo — sed tiu jam longe nemalfruu —, ŝi restos jam por fremdaj homoj.

La maljunulo mortis tiutage.

La virino estis ĝuste varmetiganta akvon por viŝi la ŝvitozan vizaĝon de la malsanulo. Kiam ŝi paŝis al la lito, lia turmentita korpo jam estis senmova.

Lia makzelo malsupreniĝis, la blanko de liaj okuloj turniĝis supren.

Por momento elŝprucis la plorado el la virino, sed poste ŝi nur profunde spirĝemis. Ŝi fermis la okulojn de la mortinto kaj per la viŝtuko, kiun ŝi jam antaŭe metis ĉemane, ŝi ligis supren lian makzelon.

Antaŭ jaroj, kiam ilia filo estis viktimo de akcidento, ili pretigis el marmoro sian komunan nomtabulon por la familia kolumbario. Nun post la nomo de la viro, la maljunulino gravurigis sur la lasitan lokon, post la vorto „mortis" la jarciferon: 2975.

Trad. L. *Rieth*

G. H. Mc Cluskey

La fina inventaĵo de s-ro Braŭn

S-ro Braŭn estis brila sed tre ekscentra inventisto, kiu ĉiam esperis, ke unu el liaj inventaĵoj gajnos por si mondan famon, sed bedaŭrinde, ili neniam venigis al li la sukceson, kion li tiom forte deziris. Eble tio estis ĉar multaj el liaj inventaĵoj prezentis ian malfacilaĵon, kiel ekzemple, la universala solvilo, kiun li inventis, sed neniam sukcesis trovi ian ujon en kiu li povus konservi ĝin.

Li eĉ inventis tion, kio estis dum longa tempo la sonĝo de ĉiuj sciencfikciistoj: la tratempan vojaĝmaŝinon. Li estis tre persvadema homo, kaj baldaŭ trovis iun por provi ĝin, sed la volontulo, kiu volis revojaĝi en la pasinton, iris tro malproksimen tra la jaroj, ĝis li atingis periodon antaŭ ol li naskiĝis, kaj tial neniam revenis, nek li, nek la maŝino.

Alia volontulo, kiu, kompreneble, sciis nenion pri la sorto de la unua, decidis vojaĝi en la estonton, sed li tro malproksimiĝis de sia periodo en la nova maŝino, kaj ankaŭ neniam revenis, nek li, nek la maŝino. Kiam tiuj faktoj fine ellikiĝis, s-ro Braŭn pasigis du jarojn en malliberejo pro senintenca murdo, sed tio tute ne malkuraĝigis lin, kaj tuj kiam oni liberigis lin, li daŭrigis siajn klopodojn inventi ion, kio alportos al li la renomon tiom deziritan.

Lia fina kaj plej sukcesa inventaĵo estis antigravita maŝino. La malgranda prototipo levis sufiĉe pezan ŝarĝon, kaj tenis ĝin pendigita en la aero ĉe punkto, kie la maŝino ne havis sufiĉe da povo plu neŭtraligi la forton de la gravito. Li tuj konstatis la valoron de tia maŝino por levi kaj transporti ŝarĝojn super la tero kaj maro, tamen tio ne kontentigis lin; li volis krei maŝinon, kiu estus sufiĉe forta por tute neŭtraligi la teran graviton, anstataŭ lukti kun ĝi, kiel la nuntempaj spacraketoj. Per tia maŝino oni povus transporti ŝarĝojn aŭ homojn, aŭ ambaŭ al la planedoj je eta ono de la kosto de la brulaĵo bezonata por ekirigi la ekzistantajn raketŝipojn.

Post jaro da vigla strebado, li fine desegnis kaj konstruigis maŝinon, kiu efektive povis tute neŭtraligi la gravitan forton de la tero. Neŭtraliginte ĝin, la maŝino kapablis flugi kiel ŝtoneto el ĵetilo per la movado de la tero, kaj poste logita per la gravito de la luno kaj la suno. Per radia regilo oni povis ĉesigi la funkciadon, kiam ĝi atingis la kosman spacon, kaj, kiam ĝi proksimiĝis al alia planedo, refunkciigi ĝin, por ke ĝi ŝvebu super la planedo aŭ malpeze descendu sur ĝin.

Por ke oni ne elflaru la sekreton de la maŝino, li konstruigis ĉiun eron fare de alia inĝeniero, kaj kunmetis la diversajn elementojn li mem. Tiam venis la tago, en kiu la maŝino estis komplete preta, kaj li decidis provi ĝin. Pro la antaŭaj fiaskoj kun la tempmaŝinoj, estis nenia espero de alia volontulo, tial li mem devis fari la provon, antaŭ ol montri ĝin al la mondo. Li eniris kaj funkciigis ĝin. La maŝino komencis tuj rapide supreniri, kaj, kiam ĝi atingis mil futojn super la tero, li provis haltigi ĝin, sed hororiĝinte li trovis, ke la ŝaltilo ŝtopiĝis, kaj li neniel povis mane movi ĝin. Intertempe la maŝino daŭre iris supren. Nur la radia regilo sur la tero povus nun savi lin, sed estis neniu en la laboratorio por funkciigi ĝin. Li ekiris al vojaĝo, el kiu li neniam revenos.

Kiam oni finfine konstatis lian foreston, oni traserĉis la laboratorion por trovi ian indikon pri la mistero de lia malapero. Baldaŭ oni trovis la malgrandan prototipon kaj ankaŭ la desegnaĵojn de la maŝino, sed sen indiko pri tio, kia maŝino ĝi estas. „Ĝi estas certe iu el la malbenitaj tempmaŝinoj de tiu frenezulo", diris la reprezentanto de la aŭtoritatoj, „du tiaĵoj jam mortigis du kompatindajn homojn, kaj nun la tria mortigis lin mem. Tuj detruu ĝin, kaj ankaŭ la desegnaĵojn!" Tiamaniere s-ro Braŭn perdis la renomon, kion li tiom vigle deziris, kaj kiun tiu ĉi maŝino estus sendube gajninta por li, senkonsidere, ĉu li estis vivanta aŭ mortinta.

Sciencfikciaj verkoj en Esperanto

La suba listo kompreneble ne estas kompleta. Mi listigas nur libroformajn verkojn, kies tuto aŭ grava ono estas scienca fikcio. Ankaŭ el la publikaĵoj pri la scienca fikcio aperas nur la plej gravaj.

Originalaj verkoj:

J. U. Giesy — J. G. Smith: En la jaro 2112 (1912); H. B. Hyams: Nova Sento (1915); Jean Forge: Saltego trans jarmiloj (1924); Jean Forge: Mister Tot aĉetas mil okulojn (1932); H. J. Bulthuis: Inferio (1938); James Denton Sayers: Invito al ĉielo (1949); Sándor Szathmári: Vojaĝo al Kazohinio (1958); Jean Forge: La Verda Raketo (1961); Sándor Szathmári: Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj (1964); Gaku Konisi: La kosmoŝipo „Edeno n-ro 5" (1971).

Tradukitaj verkoj:

J. A. Mitchell: La lasta usonano (Tr. L. Wendell, 1913); Karel Ĉapek: RUR (Tr. Moraviaj Esperanto-Pioniroj. 1926); A. N. Tolstoj: Aelita (Trad. E. Pill, 1928); Ignotus: La amo en la jaro dekmil (Tr. J. F. Berenguer, 1932); F. Karinthy: Vojaĝo en Faremidon (Tr. L. Totsche, 1934); H. G. Wells: La Tempo-maŝino; La lando de la blinduloj (Tr. E. W. Amos, 1938); Karel Ĉapek: La blanka malsano (Trad. T. Kilian, 1938); Rico Bulthuis: La alia pasinteco (Tr. Julia Isbrücker, 1952); Tragedio en la Universo: (Tr. Ivo Rotkviĉ, 1961); G. Orwell: La Bestofarmo (Tr. Gerald Tucker, 1970); Nesvadba: La perdita vizaĝo (Tr.).

Pri la scienca fikcio:

W. B. Johnson: Hyams — utopiisto. Literatura Mondo 1933, p. 97—98; Michel Duc Gonninaz: Pri la verkaro de Sándor Szathmári. Sennacieca Revuo 1967, p. 40—45; V. Benczik: Sobriga humanismo (Pri la verkaro de S. Szathmári). Hungara Vivo 1970/4, p. 9—11; Giorgio Silfer: SF=Science Fiction. Literatura Foiro 1970, decembro, p. 8—11. P. Martinelli: Sciencfikcie kun Jean Forge (Intervjuo). Literatura Foiro 1975, aprilo, p. 6—7.

Komp.: Maria *Benczik*

István Nemere

La kolektanto

Tiun transistoran radioaparaton S. pruntis al mi. Onidire li trovis ĝin dum ŝipekskurso sur iu sudokcidenta marinsulo.

S. post nelonge mortis pro aŭtomobilakcidento; tiel la aparato restis ĉe mi. Ĝi similis al neniu el konataj de mi radioaparatoj. Strangaj ciferoj kaj signoj briletis sur ĝia skalmontrilo.

Mi estas verkisto; do preskaŭ tuttage mi sidadas en mia ĉambro. Dum verkado mi ĉiam aŭskultas muzikon. Mi tre ŝatas la muzikon de malproksimaj, egzotikaj nacioj — verdirante, aŭskultante tian eĉ pli facile mi povas verki.

Iutage mi ekspertis bizaran fenomenon, turnadante la staciserĉilon. Ie mi ekaŭdis interparolon de unu virina voĉo kun multaj viraj. Tiuj viroj anoncis sin pere de numeroj. Komence mi estis konvinkita, ke mi aŭdas elsendojn por maristoj, pilotoj, taksiŝoforoj aŭ radioamatoroj, sed poste... mi eksciis, ke mi eraris.

„Alvokas mi la numeron sesdek ok, anonciĝu!" — diris la virina voĉo. Iu viro respondis de ie: „Mi anonciĝas." „Kie vi estas?" „En minus tricent tridek ok. Macedonio, Filipo kaj Aleksandro." „Ĉu vi filmas Aleksandron?" „Jes. Li estas ankoraŭ nur dekok jara." „Do rapidu — li ne vivos longe..." „Mi scias."

Aŭ alia interparolo: „Centdekunua, centdekunua, anoncu sin!" „Mi anonciĝas." „Kie vi estas?" „En 20/45." „Kiaj novaĵoj?" „Eŭropo, Berlino. Terura malordo. Oni preskaŭ ne povas moviĝi. Mia aparato estas en danĝero; fajroj kaj eksplodoj. Mi petas novan instrukcion." „Revenu al 42/60."

Komence mi aŭskultis tiujn programojn, neniom komprenante. Sed poste la afero komencis fariĝi pli komprenebla...

„Ducentsepdekkvina pestas la centron!" „La centro jene anoncas sin." „Mi havas klopodon. Kun permeso de centro, pro esploraj celoj en fizika-ekzistanta varianto mi estas en Ameriko, en 19/40. La koloro de haŭto nekonforma: nigra. Persona libereco limigita, kruelaĵoj." „Ĉu ni sendu helpon?" „Jes, mi petas." Aŭ tiu: „Kvardekkvina vokas la centron." „Centro jenas." „Mi vidis Burgesi. Li elveturiliĝis en 20/50. Li diris, ke jam sufiĉis por li la 42-a, li volas vivi aventurplene." „Certe li revenos, kredu min... Centro vokas centdeksesan, anoncu!" „Jene mi estas." „Kio nova?" „Mi estas akademiisto en 20/75. Antaŭ nelonge ni eltrovis la laseron, la holografion kaj la DNS-molekulojn. Nuntempe ni laboras plu." „Kion vi scias pri naŭdekkvara?" „Lian fizikan varianton mortigis iu atencanto. Ja tia estas ĉi tie la sorto de la profetoj... Multaj nun okupiĝas ĉitere pri narkotikaĵoj kaj pseŭdomuziko."

„Centro kvitas vian elsendon. Dudeknaŭa, anoncu sin!" „Dudeknaŭa jenas." „Kion vi faras kaj kie?" „En 0/00, en Meza Oriento. Mi faras miraklojn; iradas mi sur la akvoj, mortintojn mi revivigas, eĉ deklaras homegalecon... Post nelonge oni krucumos min..."

Plue mi ne havis jam dubojn; mi aŭskultis ja interparolojn de veturantoj en tempoj. Ties paroladojn, kiuj alvenis al ni el la futuro, al niaj historiaj epokoj, por nin observi... Iufoje tiom min ekscitis unu el tiuj programoj, ke mi subite suprenlevis la aparaton, kvazaŭ mi volus ĝin terenbati. Kvankam mi sciis, ke tion mi neniam estus faronta... Sub ĝia portilo mia fingro subite altrafis iun, ĝin nun nevideblan puŝbutonon. Peco da metalo eniĝis, kiel klavo. La aparato tuj eksilentis, nur strange kaj mallaŭte bruetis.

— No, ĝi difektiĝis, diris mi laŭte, kolere. — Nur tio mankis! — kaj mi remetis ĝin sur la tablon. La puŝbutono resaltis al sia loko, la virina voĉo de la centro demandis:

— Kion vi diris? Mi estas la centro. Mi aŭskultas vin. Ripetu!

Mi rigidiĝis, eĉ vorton mi ne scipovus eldiri.

— Mi estas la centro. Kia estas via numero? Anoncu vin!

Iomete mi ekkuraĝiĝis. Puŝante la butonon, mi alfleksis min al la aparato:

— Mi estas unu homo... — komencis mi stulte kaj hezitante daŭrigis: — Homo...

— Ĉu vi ne apartenas al ni? — demandis la centro.

— Ne. La radion... mi aŭskultadas.

— Kiamaniere vi ekhavis la aparaton? — Ŝia voĉo estis severa kaj dura.

— Oni pruntedonis ĝin al mi. Mia amiko trovis ie en Oceanio.

— En Oceanio? — por momento ekestis silento, kvazaŭ la centro pensadus. Poste ŝi aplombe deklaris: — Perdis ĝin tricentokdekoka, kiam li observis la eksplodigojn de hidrogenaj bomboj... Kie vi nun estas?

Mi sentis, mi sciis, ke plej bone estus ne respondi. Sed eble... Oni alvokos min al ŝi? Eble ankaŭ mi povos veturadi en la tempo?

— Dudeka jarcento, sepdekkvina jaro. Mil naŭcent sepdek kvin — respondis mi.

— En ĉi tiu momento kie vi estas? En urbo, arbaro, dum vojaĝo, sur strato? — interesiĝis la Centro.

— En urbo, en granda domo, sur la oka etaĝo — mi respondis la veron. Ekstere brilis la suno.

— Eliru al iu senhoma loko! — ordonis la voĉo. — Tien, kie krom vi neniu estos. Tiam denove anoncu vin!

Mi fariĝis feliĉa, kiel ankoraŭ neniam. Certe ili alvenos por mi, per tempomaŝino kaj forveturigos min! Mi ekvidos la faraonojn vivantajn, kiel prahomo mi ĉasados je mamutoj, kune kun la vikingoj mi traveturos la oceanon, mi staros en la korto de Ludoviko la Dekkvara, vestita en silko, kun ora glavo!

Jam krepuskiĝis, kiam mi aliris la marbordon. La sinbanintoj jam foriris. Forte ventis, ondoj el-elkuradis al la sablo. Neniun mi vidis. Mi kuŝiĝis sur la sablon kaj enpuŝis la butonon de la radio:

— Mi anoncas min.

— Jen la centro — alvenis tuj la voĉo de tiu virino. Kvazaŭ ŝi jam estus atendinta mian sinanoncon. — Kie vi estas?

— Borde de maro, sur forlasita plaĝo. Neniu estas ĉi tie!

— En ordo. Do vi metu la radion sur la teron kaj foriru de ĝi cent metrojn norden! — ordonis ŝi.

Mi obeis. Kiam mi ekhaltis, malproksime de la aparato — ĝi aspektis eta nigra punkteto en la foro — mi ĉirkaŭenobservis la ĉielon: kiam alvenos strangforma tempomaŝino, de kiu direkto? Ĉu mi ekvidos ĝin tuj, aŭ ĝi subite ekaperos apude, eliĝinta el la nenio, el la Tempo?

La aerondo de eksplodo terenĵetis min. Minuton mi kuŝis surde, poste malrapide mi levis kaj turnis min...

Surloke de mia radio estis nur kavo en la sablo.

Pasis iom da tempo, ĝis kiam mi ekkredis, ke ili trompis min. Eble ili faris ĝuste, el sia vidpunkto. La kavaliroj de la tempo ne povis riski.

Sed mi ne rezignis. Lastatempe mi estas kolektanto. Eĉ jam mi havas tute belan kolektaĵon. En ĉiuj gazetoj oni povas legi miajn anoncojn: „Strangformajn radioaparatojn, precipe el deveno nekonata, mi aĉetas por multe da mono."

MALLONGE PRI LA HUNGARA

Ferenc Karinthy

La abunda fantazia literaturo hungara — surbaze de teoriaj aksiomoj — estas dividebla en du ĉefperiodoj, bone limigitaj unu de la alia: la limo estas la komencaj jaroj de la 20-a jarcento.

Ankaŭ por eksterlandanoj estas konata la nomo de *Mór Jókai,* sed eble ili ne scias, ke la hungara literaturo pere de li konkeris la landon de la maturaj fantaziaĵoj. Antaŭ Jókai naskiĝis nur klasikaj utopioj, ekzemple en la fino de la 18-a jarcento la „Vojaĝo de Tarimenes" de *György Bessenyei;* aŭ kelkaj primitivaj SF-praverkoj, kiel la rakonto de *Miklós Jósika,* „Finaj tagoj" (1847), naive romantika fabelo, temanta pri la amo de gejunuloj vivantaj en du diversaj planedoj. Ambaŭ verkistoj estas signifaj en la „tradicia" hungara literaturo, kaj Jósika, kiel unua ekskursanto al la mondo de biologiaj fantaziaĵoj, eĉ estas la rekta antaŭulo de Jókai.

Pri la fantazia mondo de *Jókai* eblus plenskribi senfinajn paĝojn, kaj tion faris kaj estas farantaj multaj niaj literaturistoj. — Post liaj multegaj historiaj, romantikaj, sociaj romanoj kaj rakontoj, fine de la 19-a jarcento, ankaŭ lin ekkaptas la kapturna teknika evoluo, plie ĝiaj ebloj kaj perspektivoj. Kaj tiel li fariĝas la hungara Julio Verne, ĉar aperas unu post la alia: „Romano de la sekvonta jarcento", „Nigraj diamantoj", „Du aerostatistoj", „Ĝis la norda poluso", „La hometoj de Leaotung", „Kie la mono ne estas Dio". Koncize, la vidmanieron de Jókai karakterizas interesa duobleco: samtempa optimismo kaj pesimismo. Optimismo, ĉar laŭ li la teknikaj inventaĵoj liberigas la homaron; kaj pesimismo, ĉar la futura socio ne povos eviti la sangivan anarkion.

Jarcentfine, en la hungara literaturo prosperas la genro de la rakonto: apud kaj post Jókai prezentiĝas multaj talentaj rakontistoj, kelkaj el inter ili per fantaziaj verkoj: „Arthur Barna" de *Gusztáv Bekcsics* (1880), „La nova mondo" de *Titusz Tóvölgyi* (1880), „La inventaĵo de doktoro Szeverin" de *Viktor Cholnoky* (1907), „La rakonto de la sekvonta jarcento" de *Ferenc Herczeg* (1914), „La nova mondo" kaj „La lasta viandmanĝanto" de *Zoltán Ambrus* (ambaŭ en 1908). La rakonto de Titusz Tóvölgyi okazas en la jaro 2300, en la „tera paradizo", kiam jam realiĝis la evoluinta demokratio; doktoro Szeverin ellaboras iun medikamenton kontraŭ la dormado; la rakonto de Ferenc Herczeg estas akra satiro de la virina emancipado: diversaj temoj, sed ĉie montriĝanta, vigla interesiĝo pri la tekniko, pri la natursciencoj.



Naskiĝas ankaŭ la hungara fantaziscienca romano per la duvoluma verko de *Mihály Boross,* titolitaj: „Blua cigno" (1914) kaj „La groto de Noe" (1915). La du romanoj, en unu volumo aperas en la 20-aj jaroj — sub la titolo „La tria testamento" —, kiam la dua periodo, tiu de la moderna scienca-fantazia literaturo jam komencis prosperadi. Tiu prosperado multon ŝuldas al la iniciatoroj, precipe al *Mór Jókai;* la novaj verkistoj jam havis ian solidan bazon el kiu eliri, ĉar ekzistis kaj la adekvataj sociaj-teknikaj kondiĉoj, kaj la bonaj literaturaj rimedoj por krei la modernan, 20-jarcentan sciencan-fantazian literaturon. Inter la unuaj aperis „Vojaĝo en Faremidon" el la plumo de *Frigyes Karinthy* (1916), kiu ĝis nun restis la granda hungara klasikulo de la traktata genro. Lia „Vojaĝo" estas unu el la tre popularaj daŭrigoj de la vojaĝoj de Gullivero, nun al la lando de la „solasi"-oj; tiu verko estas konata ankaŭ por la esperantistoj, pere de la brila traduko de Lajos *Tárkony.* En alia romano, „Vojaĝo ĉirkaŭ mia kranio" (1937), surbaze de personaj travivaĵoj — komplika cerbo-operacio — Karinthy priskribas la komunan, heroan batalon de la mortonto kaj de la potenca scienco, por gardi la vivon.

La esperantistoj konas ankaŭ alian hungaran Gulliveran vojaĝon, la romanon de *Sándor Szathmári:* „Vojaĝo al Kazohinio" (1941). Tiu

SCIENCFIKCIA LITERATURO

verko, kune kun „Maŝinmondo" (aperinta hungare en 1972), estas unikaĵoj kaj en la Esperanta, kaj en la hungara literaturoj.

Inter la du mondmilitoj aperis ankoraŭ du valoraj scienc-fantaziaj romanoj. „La Pendragon-legendo" de *Antal Szerb* (1934), satira kaj humura, estas „humanscienca-fantazia" verko, ĉar la naturscien-con kiel sciencan bazon ĉi tie anstataŭigas la literaturo. Per ĉiam vigla intereso ni partoprenas en la esplorado pri iu sekreta, antaŭkelkcentjara sekto; tiun romanon ni povas paraleligi nur kun la rakontoj de la argentina Jorge Luis Borges. La „Piloto Elza aŭ la perfekta socio" de la granda poeto-verkisto *Mihály Babits* estas kvazaŭvizia kritiko de la imperiismo, militarismo; kritiko de tiu epoko, kiam la militemo mekanikigas ĉiujn homajn sentojn, ĉiun homan valoron. Ne estas akcidence, ke la „Piloto Elza" aperis en la jaro 1933.

En la lastaj jardekoj, jaroj la hungara scienc-fantazia literaturo renoviĝis, ĉar ne nur senregule aperadas verkoj, kaj ne nur aparte agadas la verkistoj, sed la „movado" mem ricevis organizitajn kadrojn.

Ni devas mencii tri faktojn. Unue: ekde 1973 aperadas la *„Galaksio"*, monata hungara scienca-fantazia antologio en 30—40 mil ekzempleroj, kiu laŭtendence — kaj espereble — iam fariĝos monata fantazia revuo. La opaj numeroj „ĝenerale" prezentas la SF-literaturon de iu lando. La revuo, „la plej bona scienc-fantazia revuo de Eŭropo", estis premiita en la II-a EUROCON-Konferenco en Grenoble, 1974, samkiel ĝia redaktoro, *Péter Kuczka* — prezidanto de la Scienca-Fantazia Laborkomitato de la Asocio de Hungaraj Verkistoj — en la I-a EUROCON-Konferenco (Triesto, 1972), pro lia vasta, fervora eldonista kaj verkista agado. Kaj tio estas la dua fakto: la Eŭropaj kaj aparte la socialismaj landoj regule organizas konferencojn pri la temo, kie partoprenas ĉiam ankaŭ hungaroj; ekzemple, nian delegacion al Poznan, en 1973, al la II-a SF-Konferenco de la socialismaj landoj, gvidis *Gyula Fekete*, renoma verkisto, gajninta premion en la sama konferenco pro la romanoj „La blua insulo" kaj „Planedo de amantoj". La tria ĝojiga fakto estas, ke du hungaraj eldonfirmoj jam ekde kelkaj jaroj aperigas scienc-fantaziajn seriojn. En *„Kozmosz Fantaziaj Libroj"* aperis ekzemple multaj verkoj de *Péter Zsoldos*, eble la plej produktiva moderna sci-fi-verkisto: „La tasko", „Kontraŭpunkto", „La Vikingo revenas", „Fora fajro". En *„Kossuth Fantazia Serio"* publikigis *Zoltán Csernai* — sekretario de la SF-Laborkomitato kaj redaktoro de ties monata Informilo — la ankaŭ eksterlande konatajn, al germana kaj ĉeĥa lingvoj tradukitajn librojn: „La balado de l'diluvo" kaj „Sekreto en la supro de la mondo".

La nombro de la hungaraj fantazisciencaj verkoj estas jam konsiderinda, apenaŭ trarigardebla, ĉar ankaŭ eksterserie senhalte aperadas bonaj verkoj kiel, interalie, tiuj libroformaj de *Gyula Hernádi, Lajos Mesterházi, Kálmán Pápai, Miklós Rónaszegi, Mária Szepes*. Signifaj estas la teoriaj artikoloj de *Péter Szentmihályi-Szabó*.

Por fini, el la bunta sortimento ni mencias ankoraŭ tri interesajn romanojn.

Tibor Déry, fama romanisto, translokigis la sinjoron G. A. en la seniluziigan landon X. („Sinjoro G. A. en X."). En la ne malpli seniluziiga utopia lando de *György Nemes* „Ne estas sekreto", ĉar la homaro kreis perfektan socion, kie la gejunuloj estas la pensiuloj kaj la maljunularo laboras. Kaj fine, la heroo de *Ferenc Karinthy*, sinjoro Budai, alvenas al „Epepe-lando", lando jam eĉ ne seniluziiga, tute konfuza, ĉar la povra hungara vojaĝanto nenion komprenas; ne povante deĉifri la tute nekonatan, fremdan lingvon, li neniam revenas por rakonti al ni persone la tie akiritajn spertojn.

Zsuzsa *Varga—Haszonits*



Gyula Fekete



Zoltán Csernai

Zora Heide

MISTERA HOTELO

Mi intencis resti kelkajn tagojn en Londono. De mia angla amiko mi ricevis la adreson de la hotelo, kies posedanton li konis.

Ĝi situas en la suda parto de la urbo, kaj, alveninte, mi unue observis grandan imponan konstruaĵon, duetaĝan, angule starantan kaj okupantan spacon inter du stratoj. Simplaj blankigitaj muroj donis al la konstruaĵo ĉarmon.

Kvankam je la tagmezo, la trafiko estis preskaŭ nenia. Kelkaj aŭtomobiloj kaj kelkaj piedirantoj, kies paŝoj ne interrompis la silenton.

Mi sonorigis. Malfermis la pordon juna, ĉarma viro, kies nigra barbo kaj lipharoj aspektis tiel, kvazaŭ li estus sudlandano. Mi klarigis al li mian alvenon kaj petis lin prezenti min al la hotelestro.

„La hotelestro subite mortis antaŭ kelkaj tagoj. Mi estas lia nevo, kaj estas je via dispono."

Mi mem ne konis la hotelestron, sed tiu ĉi subita sciigo subkonscie maltrankviligis min pro tio, ke tiu ĉi okazaĵo eble enmiksos min en ion strangan, nekonatan kaj danĝeran.

Sed pro iu kaŭzo mi ne foriris por serĉi alian hotelon, sed sekvis lin al iom malhela kaj malvarma koridoro. En angulo, tute apud la pordo, staris skribotablo nedifineble malnovstila, kaj sur ĝi staris objektoj tiamaniere, ke oni havis la impreson, ke nenio estis tuŝita, post kiam la mortinta estro forlasis sian hotelon. Apud ĝi estis alia pordo kaj dekstre de la ŝtuparo staris ŝranko plena de libroj.

Mi eksidis sur la seĝon proponitan al mi, dum la ĉarmulo trovis la gastolibron. En ĝi estis mia nomo. Li bonvenigis min.

La pordo apud la skribotablo malfermiĝis kaj aperis svelta junulino en nigra robo.

„Mia edzino, sinjorino."

Li klarigis al ŝi mian ĉeeston kaj interkonsentis, kiun ĉambron ili elektu por mi. Mi ne estas superstiĉema, sed alvenanta nigra kato neperceptebla maltrankviligis miajn jam streĉitajn nervojn.

„Ĉu la hotelo estas plena de gastoj?" — mi demandis.

„Nur kelkaj ĉambroj. Nun ne estas gasta sezono, sed ni esperas, ke baldaŭ la hotelo fariĝos pli vigla."

Akompanante min ĝis la ĉambro en la dua etaĝo, li montris al mi ĉiujn necesaĵojn. Ni babilis survoje kaj daŭrigis tion en la ĉambro. Li rakontis al mi pri sia onklo, kaj pri kelkaj epizodoj el ties vivo. Li estis tre babilema kaj sciigis min pri siaj estontaj planoj pri ia intensa reklamigo de la hotelo, kaj pri ĝia renovigo.

La parolado estis kutima ceremonio, sed iu stranga sento ne forlasis min, nome, ke la hotelo troviĝas sur iu izola insulo kaj en ĝi mi devas resti kun du tute nekonataj personoj, ĉar por mi la ĉeesto de la aliaj gastoj estis iom duba.

Li fine foriris, kaj, freŝiginte la korpon perduŝe, mi vestis min por eliro. Mi intencis posttagmeze vidi parton de la urbo, kaj, ĉar mi sentis min laca, enlitiĝi kiel eble plej frue.

Trapasante senhomajn koridorojn kaj ŝtuparojn, mi estis sekvata de la nigra kato, kiu ne volis forlasi min, kvazaŭ atentanta, ke mi ne solvu la enigmon de la soleco.

La nova hotelestro staris apud la skribotablo foliumante la gastolibron. Mi adiaŭis lin.

„Bonvolu preni la ŝlosilon, vi certe alvenos sufiĉe malfrue. Ni kutimas enlitiĝi frue."

La urbo estis impona, sed tra mia entuziasmo plektiĝis la fadeno, kiun mi image kunportis el la hotelo kaj kiu debobeniĝis. Ĝi malvolvis la ĵus forlasitan historieton, kies finon mi ne kapablis antaŭvidi.

Kial mi envolviĝu en ion malagrablan? Mi povis simple foriri, sed, bedaŭrinde, ni estas devigitaj sekvi la sorton de niaj reagoj kaj decidoj.

Min lacigis la homamaso, la Londona trafiko kaj promenado, mi fakte sopiris al trankvilo kaj dormo.

Estis post la 8-ra horo kiam mi ree staris antaŭ la hotelo. Nur la stratlanternoj lumigis ĝin. Neniu lumigita fenestro estis videbla. Logika konkludo: la malmultaj gastoj ankoraŭ ne revenis kaj la geestroj dormas.

Kun stranga sento de korpremiĝo mi malfermis la pordon, lumigis la koridoron kaj surŝtupariĝis. El kiu direkto venis la nigra kato, mi ne rimarkis, sed ĝi sekvis min kvazaŭ tio estus la plej natura kaj kutima afero. Ĝi haltis apud mia pordo.

Mi eniris la banĉambron, kaj, reire al la ĉambro, mi forlasis la katon apud la pordo, kie ĝi verŝajne restis, ĉu por ataki aŭ por gardi min?

Nenia bruo estis aŭdebla. Mi sentis min la sola gasto en la stranga hotelo.

La ĉambro estis eta, sed intima. Apud la fenestro vid-alvide de la pordo staris la lito, granda, malnovstila kun pura kaj blanka tolaĵo. Flanke, noktoŝranketo kun noktolampo. Alimure tualetotablo, en la mezo tablo kaj du seĝoj.

Mi ŝlosis la pordon kaj enlitiĝis. Kvankam laca, mi ne sukcesis ekdormi; mi havis senton de soleco kaj la ĉeesto de io nekonata turmentis min. Mi eklegis libron, sed la enhavo ne eniris mian spiriton.

Mi analizis la situacion. Povas esti tute natura okazaĵo, ke neniu gasto ĝis nun alvenis; la duetaĝa hotelo kun siaj multaj ĉambroj kaj kun nur kelkaj gastoj povas esti silenta.

Mi estingis la lampon kaj provis trankviligi min per logikaj asertoj. Ĉio vanis. Premis min la senbrua cirkaŭaĵo, kaj mi ree eklumigis la lampon. Regis silento, silento, kiu fariĝis danĝera. Miaj okuloj fermiĝis kaj perforte mi provis teni ilin malfermitaj. Mi denove estingis la lampon, kaj, ne povante regi miajn okulojn mi ĉesis batali kontraŭ la dormo.

En tiu lasta konscia momento mi aŭdis ion strangan, kvazaŭ iu starus apud la pordo premante ĝin korpe. Eble estas nur la kato?

Ne, iu persono staras ĉe la pordo. Mi sentis, ke mia lasta horo alproksimiĝis.

Kiamaniere min defendi? Kaj kontraŭ kiu? Sur la tualeta tablo staris peza metala kandelingo. Ĝi povas esti efika defendilo.

La situacio fariĝis pli kaj pli neeltenebla kaj mia nerva stato atingis la kulminon. Fulme mi ellaboris planon en mia kapo, kiel generalo, kies armeo subite estas atakata de nekonata malamiko, kies fortojn li ne konas.

La fenestron mi ne povis utiligi. La alteco de la duetaĝa hotelo estas riska por elsalti. La strato estis iom larĝa kaj la vid-al-vida domo troviĝis ĉe la fino de granda ĝardeno kaŝita de boskoj kaj altaj arboj. Nur la tegmento estis videbla. Se mi malfermus la fenestron por krii pri helpo, ĉu iu aŭdus min kaj min helpus antaŭ ol la pordon oni perforte malfermus kaj mi fariĝus senkonscia aŭ eĉ mortinta de la bato?

Kiom da minutoj aŭ eĉ sekundoj pasis? Mi ne sciis, sed subite tra la seruro mi aŭdis voĉon, kies sekson kaj aĝon mi ne povis difini. Mi klare aŭdis: „Helpu min!"

Nova konfuziĝo ekregis min. Se estas, laŭ mia supozo, en la hotelo nur mi kaj la geestroj, kiu do bezonas helpon?

Sed eble estas nur embuska metodo por ke mi eliru el la ĉambro?

Post tiu okazaĵo nek paŝojn, nek alian strangan sonon mi aŭdis. Estis silento, netolerebla silento ĉirkaŭ mi. Kaj ankaŭ netolerebla atendado ĝis mateniĝo, la sola helpo por eliri el la turmenta nokto.

Mi staris en la mezo de la ĉambro, kaj kiom longe mi staris tie en defenda pozo, mi ne konsciis. La horloĝo tiktakis tre malrapide, kaj ĉiu minuto daŭris tutan tagon.

Sed okazis nenio nova. Mi plu atendis atakon de nekonata persono. La silento jam estis malpli eltenebla, ol iu ajn rompado de ĝia terureco. Fine, laca de la starado, mi sidiĝis sur la lito, kunportinte la kandelingon apuden. Mi decidis batali, ĝis mi, aŭ la alia, perdos la vivon.

La unuaj signoj de la mateniĝo estis videblaj, kaj tio estis la lasta okazaĵo, kiun mi memoras, antaŭ la subita endormiĝo.

Kiam mi vekiĝis, estis hela tago. Tra la fenestro mi vidis kelkajn piedirantojn, kaj aŭdis bruon de aŭtomobilo.

Ne analizante, kio povus esti okazinta dum mi dormis, mi ekkaptis en mia cerbo la solan konstaton, ke mi estas vivanta.

La sekva reago — kiel eble plej rapide elhoteliĝi. Mi vestis min, malfermis la fenestron por eventuala helpkrio, se bezono tion diktos, kaj rapidmove mi malŝlosis la pordon.

Malantaŭ ĝi staris neniu. Eĉ ne la nigra kato. La koridoro estis malhela, sed sufiĉe luma por vidi, ke ĝi estas malplena. Preninte la pakaĵon, mi singarde ĉirkaŭrigardis la ŝtuparon, por ke neniu ataku min, kaj kiam mi atingis la malsupran koridoron, mi fulme rimarkis, ke sur la skribotablo regis ordo, kvazaŭ neniu dum longa tempo utiligis ĝin.

Plena silento. La pordo estis ŝlosita, mi mem ja ŝlosis ĝin hieraŭ vespere, kaj, malferminte ĝin, mi ensorbis la aeron de la libereco. Mi estis saviĝa.

Sed eble okazis murdo dumnokte?

La unuan renkontitan personon mi demandis pri la vojo al la plej proksima policejo. Ĝi troviĝas ne malproksime de la hotelo.

Kun streĉitaj nervoj, pensante, kiamaniere klarigi al la policisto la noktan okazintaĵon, kaj kun iom da fiereco pri la eventuala eltrovo de la plej terura murdo de nia jarcento, mi subite trovis min en la policoficejo, en kiu sidis ĉe skribotablo majesta, altstatura Londona popolgardanto.

„Okazis murdo, sinjoro policisto" — mi balbutis.

„Ĉu vi bonvolas klarigi al mi pli detale, kie kaj kiam?"

Mi menciis la nomon de la hotelo.

„Sed la hotelo estis fermita post la morto de la hotelestro, lin mi konis tre bone."

„Mi tranoktis en la hotelo, kaj lia nevo akceptis min."

Li rigardis min tiamaniere, kiel oni rigardas personon, kiu deklaras, ke li estas Napoleono Bonaparto.

Li prenis la telefonon kaj diskutis vigle kun iu. Fininte la paroladon, li diris al mi:

„Mi ĵus parolis kun la edzino de la hotelestro, kiu konfirmis, ke ili havas neniun nevon, kaj ke la hotelo restis ŝlosita post la morto de la edzo. Vi posedas grandan fantazion, sinjorino, aŭ vi bezonas la plej rapidan kuracistan helpon."

Mi foriris kun la konvinko, ke mi estas survoje perdi la prudenton.

Instinkte mi direktiĝis al la hotelo. Kio ajn okazu, mi deziras klarigi la fakton, ĉu mi posedas ĝis nun nekonatan fantazion aŭ okazis dumnokte io mistera.

La pordo restis malfermita. En la koridoro mi surplankigis mian pakaĵon kaj kun mikso de timo kaj scivolemo, mi krozadis tra la hotelĉambroj senĉese singarda, por ke neniu aperu malantaŭ miaj ŝultroj.

Nenia vivo montriĝis, kaj kio okazos, se la konstato pri mia nura fantaziado konsciiĝos en mia laca cerbo?

Ĉe la pordo, en la lasta ĉambro kuŝis senviva la edzino de la mistera hotelestro.

Mi trovis la telefonlibron kaj telefonis al Scotland Yard.

„Mi sciigas vin, ke en la hotelo X en la strato Y okazis murdo. Eironte la ĉefan koridoron, direktu vin maldekstren ĝis la fino de la koridoro. Eniru la lastan ĉambron maldekstre."

„Via nomo, sinjorino . . . ?"

„Ĝi ne gravas. Mi ne estas la murdinto. Pri la detaloj bonvolu demandi la policiston de la proksima policejo. Li posedas troan fantazion, aŭ li bezonas la plej baldaŭan kuracistan helpon. Good by."

Mi interrompis la telefonadon, prenis la kofron kaj direktis min al la stacidomo. Londonon mi forlasis nerve laca, sed kun la konscia konstato, ke mi ne perdis la prudenton.

Ferenc Molnár

LA LUDISTO

Jen la historio pri mia bona amiko jam delonge mortinta. En mia junaĝo mi pasigis kun li multajn jarojn. Li estis artisto: pentristo, skulptisto, arkitekto. Grandega talento, granda temperamento kun la signoj de geniulo. En tiuj jaroj, kiam nia amikeco estis la plej strikta, li pasie kartludis. En la klubo de la ĵurnalistoj en Ostende, en Monte Carlo, ĉie, kie estis eblo. Li estis aŭdaca sed bonŝanca ludisto. Ofte mi pasigis tutan nokton sidante apud li kaj admiris liajn aŭdacajn ideojn kaj kelkfoje lian nekredeble bonan instinkton. Kiel ĉiu vera genia ludisto — se en la unua kvaronhoro post mallonga ŝanceliĝo — li kaptis la fortunon, tiun tagon li ne forlasis ĝin plu.

Iun tagon li proponis al mi vojaĝi kune al Vieno por kelkaj tagoj. Li jam delonge plendis, ke lia stomako ne estas en ordo.

— Nun mi havas multe da mono — li diris — lastatempe mi ludis kun granda fortuno. En Vieno ĉe kuracistprofesoro mi ekzamenigos min.

Ni vojaĝis al Vieno, kune ni iris al la profesoro, kiu ekzamenis kaj pridemandis lin. Mia amiko devigis min iri kun li al la profesoro, ke mi estu la atestanto de la ekzameno. La ekzameno estis malagrabla. La profesoro diris, ke lia stomako estas en bona sanstato, sed li devas nun tuj konsulti nervkuraciston. Li diris la nomon promesante, ke se ni tuj iros, dum nia aliro li telefonos al la profesoro.

Ni ambaŭ estis tiel inteligentaj laikoj, ke ni konjektis ion malbonan. Temis pri stomakmalsano kaj la kuracisto interesiĝis ne pri la stomako, sed plie pri la genu- kaj pupilrefleksoj, ... tio vere ŝajnis al ni io tre grava. Do ni iris al la nervkuracisto, en kies ĉambron mi devis denove sekvi mian amikon. Li devis sin malvesti nuda kaj fari la kutimajn movojn: marŝi okulojn ferminte, tuŝi en la aero precize la centran fingron de la dekstra mano per la centra fingro de la maldekstra mano ktp. Poste sekvis ekzameno, kiun ĝis nun mi ne konis. Mia amiko devis kuŝiĝi surventre sur kanapo. La kuracisto prenis ordinaran, longan ĉapelpinglon, kiun la nuntempaj sinjorinoj jam tute ne konas. Tiutempe la nervkuracistoj kutimis elprovi per tiu la sentemon de la dorsnervoj. La provo konsistis el tio, ke la kuracisto apenaŭ tuŝis jen per la pinto de la pinglo, jen per la globo — troviĝanta sur la alia fino de la pinglo — la dorson de la malsanulo kaj la surventre kuŝanta malsanulo devis diveni, ĉu la pinglopinto aŭ la kugleto tuŝis lian nudan haŭton. Tion la kuracisto eksplikis kaj la ekzameno komenciĝis. La kuracisto unue tuŝis per la pinto de la pinglo lian dorson.

— Pinto — diris mia amiko.

— Ĝuste — diris la kuracisto kaj denove li tuŝis lin per la pinto de la pinglo.

— Denove la pinto.

— Tre bone. Kaj nun?

— Ankaŭ nun ĝia pinto.

— Bonege.

Nun li tuŝis lin per la globo.

— Globo — diris la paciento.

— Kaj nun?

— Pinto.

— Tre bone.

Kaj la ekzameno tiel daŭris. Ok aŭ dekfoje tuŝis lin la kuracisto kaj li ĉiam precize diris, ĉu tio estis la pinto aŭ la globo.

Mi ekspiris. Tiu sento, kiu min afliktis dumvoje — forpasis. Gaje ni malsupreniris la ŝtuparon kaj mi volis jam rimarki ion pri la nervoprofesoro ... kiam mia amiko ekparolis.

— Mi estas tre malsana.

Mirege mi rigardis lin.

— Jes, jes — li diris —. Mia kazo estas tre grava.

— Kiel? — mi respondis. — Ja la ekzameno sukcesis bonege! Unue mi timis, sed kiam mi vidis, ke vi senerare sentas la ĉapelpinglon ...

— Vi — li diris kun malĝoja rideto — mi ĵuras al vi, ke eĉ unufoje mi ne sciis, ĉu li tuŝas al mi la dorson per la pinto aŭ per la globo de la pinglo. Kiam li tuŝis min unue — logike mi konkludis — kiu ekzamenas per pinglo, al tiu unue venas en la kapon la pinto de la pinglo, ĉar la esenco de la pinglo estas ĝia pinto kaj ne la globo. Kaj tiam la kuracisto kulpis tiun eraron, kiam mi diris „pinto", li diris „ĝuste". Ĉi-momente klariĝis en mia cerbo, ke mi ludas je du ŝancoj, ĉar koncerne la ĉapelpinglon, ekzistas du ebloj: ĝia pinto aŭ ĝia globo same kiel en Monte Carlo en la *roulette* la *rouge* kaj la *noir*. Kaj en tio mi estas sperta, krome jam ekde semajnoj mi ludas kun granda fortuno. Kiam la duan fojon li tuŝis min per la pinglo, mi ludis refoje la pinton kaj li diris denove: tre bone. Tiam trakuris en mi tiu agrabla ekscito, kiun havas la ludisto, kiam li sentas, ke hodiaŭ la fortuno estas en siaj manoj. Denove kaj denove mi ludis la „pinton" kaj kiam ankaŭ la kvaran fojon mi gajnis, mi sentis, ke la serio finiĝis kaj nun venos la globo. Denove mi gajnis. Poste mi ludis la konatan roulette-leĝon: post la *rouge*-serio venas nur unufoje la *noir* kaj ĝi „resaltas" denove sur la *rouge*. Tio sukcesis kaj tiel simple mi gajnis unu post la alia ok aŭ dek ludojn, kvazaŭ mi ludus en *roulette* la ruĝan kaj la nigran ... kio tute ne estas malfacila kaj ne malofta. Okazis, ke kelkfoje en Monte Carlo mi gajnis dekkvin-dudek ludojn unu post la alia ... Se la kuracisto silentus post ĉiu tuŝo, vere mi estus en granda embaraso.

Ne estas facile por mi forgesi nek lian rideton kun tiu klarigo, nek tiun historion.

Tr.: d-ro István *Nagy*

VESPERO EN LA PARKO

Senmovas arboj en la parko,
sur la ĉiel' la kurba barko
de Nokt', la Luno flosas.
Oblikve tra la branĉtegmento
vidiĝas en la okcidento
la sun-kisinta firmamento,
kiu nun pale rozas.

Transmonda estas la trankvilo.
Jen silentiĝis eĉ la trilo
de l' bruaj birdkantistoj.
Lulzume nur skaraboj krozas,
la arbobranĉoj dorme pozas,
la parko lace ekripozas
post la someraj distroj.

Sed la odoroj estas viglaj!
Sin trudas timianoj tiklaj,
rezedoj, mentoj, malvoj,
freŝa odor' de l' rosa humo,
kaj tra ĉi odor-frenezumo
triumfe pafas rozparfumo
per ĉiovenkaj salvoj.

Mi sur la mola herbo kuŝas
kaj mian varman vangon tuŝas
rosa herbet' petola.
Kun tiu malhelblua arko
de l' firmament' kun la Lun-barko,
kun parfumsonĝoj de la parko,
mi estas sola, sola.

La Nokto venas brunkolore,
la Nokto nigras jam. Sed fore
La Urb' matenkrepuskas.
La Urb' albrilas por averto:
necesas tie lukti lerto,
en grotoj de ĉi ŝtondezerto
la hom' je hom' embuskas.

Necesas tie lukti, skermi,
aŭ ekstermiĝi aŭ ekstermi
kun turmentata cerbo,
necesas en tumulto puŝi,
la donacitan vivon fuŝi...
Beate estas kuŝi, kuŝi
sur herbo aŭ sub herbo.

KÁLMÁN KALOCSAY

(1891—1976)

La tuta esperantistaro suferis doloran perdon. La 27-an de februaro 1976 forlasis nin Kálmán Kalocsay, la elstara eminentulo de la E-literaturo kaj lingvoscienco, membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA, honora prezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio, ano de la redaktoraro de Hungara Vivo.

Kálmán Kalocsay naskiĝis la 6-an de oktobro 1891 en Abaujszántó. La mezlernejon li vizitis en la urbo Miskolc. Post la universitataj studoj — en la medicina fakultato — li akiris diplomon en 1916, kaj kiel kuracisto, poste ĉefkuracisto li laboris en la hospitalo de infektaj malsanoj en Budapeŝto. Kalocsay estis eminentulo ankaŭ en medicino, de 1929 docento en la universitato. Li instruis, verkis valorajn faklibrojn. Post la liberiĝo li ricevis la altan titolon: „Doktoro de la medicinaj sciencoj".

Kun Esperanto li konatiĝis en 1911. Sur la literatura kampo de E-o li debutis en 1921, kiam aperis liaj originalaj poemoj sub titolo *Mondo kaj Koro*. En 1922 Baghy, Kalocsay kaj T. Schwarz fondis la faman revuon *Literatura Mondo*, kiu baldaŭ fariĝis la plej konata literatura, arta organo de la Esperanta mondkulturo, kerno de la „Budapeŝta Skolo". La unuan verkon de Kalocsay rapidritme sekvis pluaj: *Kantanta Kamparo* (popolkantoj), la traduko: *Johana la Brava* (epopea fabelo de Petőfi), traduko de *La Tragedio de l' Homo* (drama poemo de Madách). *La eterna Bukedo* (poemoj, trad. el 22 lingvoj) reprezentis tiutempe la pinton de la E-tradukarto. Denove originalaj poemoj: *Streĉita Kordo*. Poste transplantigo de Goethe kaj Dante. En la eldono de LM aperis la *Hungara Antologio*, kiun Kalocsay ne nur redaktis, sed la plejparton li mem tradukis.

Post la dua mondmilito naskiĝis pluaj verkoj: *Ezopa saĝo* (fabeloj), traduko de Baudelaire kaj Heine, la brile transplantitaj shakespearaj verkoj: *Reĝo Lear, Somernokta Sonĝo, Tempesto*. Eĉ unu el ili estus sufiĉa pruvi la talenton de Kalocsay, kaj pruvi samtempe la esprimpovon de la internacia lingvo.

Kaj kiom grandskala estis lia agado sur la tereno de la lingvistiko, gramatiko: *Lingvo, stilo, formo, Parnasa gvidlibro, Plena gramatiko* (verkita kune kun Waringhien), *Sistema Esperanta gramatiko*. Feliĉe: kelkajn tagojn antaŭe ke lin sternis la malsano, la kunverkisto Kalocsay povis preni en manojn la ĵus aperintan volumon — *6000 Frazeologiaj Esprimoj* —, sian lastan verkon.

La verkado de Kalocsay en E-literaturo kaj poezio atingis altaĵon Parnasan. Tiun rekonis ne nur Esperantujo, sed ankaŭ la Hungara PEN-Klubo, kiu en 1970 distingis lin per honor-medalo.

La forpaso de Kalocsay estas duobla perdo por Hungara Vivo. Nian revuon li taksis kiel posteulon de Literatura Mondo. Krom lia tasko — lingva revizio — multe helpis la redaktadon, eĉ se la tempo urĝadis nin, senhezite li sidis al la skribmaŝino kaj retajpis la nezorgeme pretigitajn manuskriptojn.

Por Kálmán Kalocsay Esperanto estis arda pasio, por kio li laboris ĝis sia lasta spiro. Multe ni sentas kaj sentos la vakuon, kiun postlasis nia Kolomano. Iom, por konsoli nin: li postlasis ankaŭ riĉan vivoverkon, tian spiritan valoron, kiun heredas la tutmonda esperantistaro.

Hungara Esperanto Asocio
Redaktoraro de Hungara Vivo

LA FUNDAMENTO KAJ LA PALACO

Ho Esperanto, mia temo
amata, kiam la kantemo
min kaptas, vidu, lastatempe
min jam minacas anatemo,

ĉar mi kuraĝis vin tro ami,
jes, oni volas min proklami
hereza, ĉar per nova brilo
kaj riĉ' mi volas vin ornami.

Sed mi toleras sen lamento;
defendas min la argumento:
palacon pompan alpostulas
la pompe firma fundamento.

Ni do konstruu sen ŝancelo
tiun palacon de la Belo.
Por kiuj fundament' sufiĉas,
nu, tiuj loĝu en la kelo!

Humprey Tonkin

REĜO LEAR KAJ LA UNIVERSALECO DE SHAKESPEARE

(Internacia Somera Universitato, Londono 1971)

(La unua parto aperis en la numero 1976/1. de HV)

Lear ne nur ne komprenas la politikon, sed ankaŭ (oni fakte devus diri »precipe«) ne komprenas la amon. En tiu mondo ideala, kies ekziston, almenaŭ en la imago, postulas la koncepto mem de la tragedio, amo subtenas kaj raciigas ceremonion kaj aŭtoritaton. La reĝa amo al sia popolo, la patra amo al siaj gefiloj, la frata amo al gefratoj — ĉio ĉi ekvilibrigas justecon kaj kompaton, ordonon kaj permeson.

La unua sceno kompreneble unuigas la temon de amo kun tiu de politiko. La »ama konkurso« inter la tri filinoj prezentas en preskaŭ absurda kaj nepre stilizita maniero la centran motivigon de la tuta dramo. Estas grave emfazi la stilizitecon de la tuta epizodo. Oni ne klopodu prezenti la scenon kiel realisman eventon, unue ĉar tio tro limigus ĝian efikon, kaj due ĉar ĝi tro streĉus la kredeblecon. Ni vidas en tiu ĉi sceno kvazaŭ tonditan, netigitan re-prezenton de la disfalo de la homaj rilatoj — disfalo precipe sur politika kaj persona niveloj, tamen eĉ tiuj niveloj siavice ne estas ekskluzivaj, sed kvazaŭ reprezentas ĉiujn specojn de homaj rilatoj.

La perilo de tiu disfalo estas la lingvo. Lingvo kaj la agoj apartiĝas. La vortoj de Goneril kaj Regan fariĝas maskoj, kaŝiloj de la vero:

> Sir', mi vin amas pli ol eldireble...
> ...jes, kun amo,
> por kiu spiro feblas, vortoj magras,
> tiel mi amas vin, supermezure. (pĝ. 11)

»Supermezure« — tio memevidente estas la ĝusta karakterizilo por la tuta evento. Kiel saĝe atentigas Cordelia pli poste: »kial la fratinoj havas edzon, / se ili diras ami sole vin? / « Sed post perdo de tiu »mezuro« la vortoj de Cordelia apenaŭ povus efiki:

LEAR: Kion do vi scios konfesi por akiri eĉ pli riĉan trionon ol la fratin-par'? Parolu.
CORDELIA: Nenion, patra moŝto.
LEAR: Ĉu nenion?
CORDELIA: Nenion.
LEAR: Nenio ja fariĝas el nenio. Parolu ree.
CORDELIA: Malfeliĉulino, kia mi estas, mi ne povas levi la koron en la buŝon. Vian moŝton laŭdeve amas mi, nek pli, nek malpli. (pĝ. 12)

La vortoj de Cordelia akre starigas distingon inter ŝi kaj la du aliaj fratinoj. Ili uzas vortojn, parolas pri »supermezuro«; ŝi finfine forĵetas lingvon entute kaj parolas strikte pri »devo«. La senkompromisa kontrasto inter tiuj du flankoj fiksas la limojn de la drama argumento. Memevidente la reago de Cordelia ne estas ĝuste *probabla* en la ordinara senco: ĝi estas unu elemento en dramigita formala problemo, por kio Shakespeare efektive jam preparis nin per la komenca sceneto inter Kent kaj Gloucester.

Valoras je tiu ĉi stadio ĵeti la okulojn al tiu komenca sceneto.

Interne de 30 linioj Shakespeare starigas la ĉefajn motivojn de la dramo. La rapideco de la tuto estas eksterordinara. Li uzas sian kutiman komencmetodon: konversacion kiu komenciĝis ekster la scenejo. Kent kaj Gloucester aperas, parolante. Diras Kent:

> Mi kredis, ke la Reĝo pli favoras la Dukon de Albany ol tiun de Cornwall. (pĝ. 9)

Ne, respondas Gloucester, »ĉe la divido de la reĝlando ne montriĝas, kiun el la Dukoj li taksas pli alte.« Ni do jam scietas pri la Dukoj, pri la divido de la regno, kaj ni ankaŭ enkondukiĝis en la politikan temon de la dramo.

Sed la konversacion interrompas la fizika ĉeesto de Edmund. La du promenantaj korteganoj haltas antaŭ li: la fluon de la vortoj haltigas kvazaŭ fizika obstaklo: »Ĉu tiu ĉi ne estas via filo, sinjoro?«

Kial Kent ne *scius*, ke temas pri la filo de Gloucester? Ĉu li ne estas kamarado, kolego de Gloucester? La kialo estas tio, ke Edmund »estis eksterlande naŭ jarojn, kaj li devas denove foriri.« Li estas do fremda elemento en la kortego — ekstera katalizilo kaj ankaŭ iasence suspektinda (almenaŭ ĉe la patriota londona spektantaro). Li estas ankaŭ bastardo:

> Mi havas filon, sinjoro, laŭleĝan, proksimume unu jaron pli aĝan ol ĉi tiu, tamen, ne pli karan al mia koro. Kvankam ĉi tiu knabo venis en la mondon iom impertinente antaŭ ol oni sendis voki lin, tamen lia patrino estis bela, kaj bona amuzo estis ŝin ame uzi lin farante, kaj mi devis rekoni la putinidon. (pĝ. 9)

La traduko de Kalocsay, kun sia emfazo pri »ama uzado,« bele kaptas la misajn valorojn de Gloucester. La sindorloto, kiu kreis Edmund, estas nur konvencie alia ol la sindorloto, kiu igas Goneril kaj Regan tiel bele vorti, Lear tiel insisti pri tiu vortado, Edmund plekti kaptilon por sia duonfrato. Adultado, nebridita seksemo estas konstanta submotivo tra la tuta dramo, centrigita precipe en Edmund, kies seksa logo kun fatala neeviteblo tiras sur Goneril kaj Regan la katastrofon.

La apero de Edmund ankaŭ preparas nin por la konflikto de la generacioj, alia aspekto de la ama uzado, speciale praktikata de Goneril kaj Regan. La fruaj vortoj de Kent al Edmund: »Mi devas vin ami, kaj klopodi, ke mi vin konu pli bone« reliefigas la interdependon de la kortega socio, kvankam ĝi ankaŭ havas strangan ironion en la kunteksto de la tuta dramo.

En la unua sceno Kent funkcias ĉefe kiel kontrasto al Cordelia. Lia interveno potence kunigas la diversajn aspektojn de la socia interdependo:

> Reĝo Lear,
> kiun mi gloris kiel reĝon, amis
> kiel la patron, sekvis kiel mastron,
> plektis, patronon grandan, en la preĝojn... (pĝ 14)

Reĝo... patro... mastro — eĉ sanktulo: la vortoj montras la efikojn de la misago de Lear. Lear, kolere, lin elpelas el la kortego, kaj Kent deklaras: »Ekzil' ĉi estas kaj Liber' forvagas.« La paradoksoj, kiujn Kent voĉigas, formas parton de la kolapso de la valoroj. Tiu kolapso estas fiksita en niaj mensoj per tiuj tre ordinaraj vortoj, sed samtempe gravede terurigaj, kiujn eldiras Lear:

> Nenio ja fariĝas el nenio.

Je sia plej evidenta nivelo la frazo nur indikas, ke oni ne povas fabriki *ion*, kiam oni posedas nur *nenion*. Sed ĝi ankaŭ indikas, ke neniaj posedaĵoj sekvos el neniuj vortoj. Pli ironie ĝi indikas, ke nur nenieco sekvos el la malplena ŝarado, kiun Lear nun reĝisoras.

La nocio pri nenieco eĥas tra la unuaj scenoj. Specife, la dua sceno, inter Gloucester kaj Edmund, havas tre similan dialogon:

GLOUCESTER: Ha, Edmund, kiel do? Kaj kio nova?
EDMUND: Kun la permeso de via moŝto, nenio.

GLOUCESTER: Kial do tiel fervore vi klopodas kaŝi tiun leteron?

EDMUND: Mi scias nenion novan, via moŝto.

GLOUCESTER: Kian paperon vi estis leganta?

EDMUND: Nenian, via moŝto.

GLOUCESTER: Nenian? Kial do tiu terura urĝo meti ĝin en la poŝon? (pĝ. 21)

Je sia unua apero la Folulo reprenas la saman temon. Li kantas kanton, kiu pastiĉas tiujn popularajn poeziajn listigojn de atribuoj de saĝulo:

Montru malpli ol vi disponas, diru malpli ol vi ekkonas... ktp.

Rezulte, »vi havos panon, ŝinkon, / ĉion plus unu ŝilingon.« Respondas Kent, »Ĉi tio estas nenio, Folulo.« Sed *kio* estas nenio? La kanto, aŭ la nocio pri »ĉio plus unu ŝilingo« — »ĉio, kaj ankoraŭ iom«? La ironia signifo de la vortoj kompreneble memorigas nin, ke ĝuste »ĉion plus unu ŝilingon« postulis Lear siavice.

FOLULO: Ĝi similas do la spiron de nepripagita advokato — vi donis al mi nenion por ĝi. Ĉu vi ne povas uzi por io la nenion?

LEAR: Neniel, knabo. El nenio oni povas fari nenion.

FOLULO: *(Al Kent)* Mi petas, diru al li, ke jen kiom estas lia landorento; al Folulo li ne kredus tion. (pĝ. 33)

Kiel ofte okazadas tra la dramo, la Folulo remaĉas ne nur okazintajn eventojn, sed ankaŭ okazintajn parolturnojn, montrante al ni ilian ironian signifon. Plej grave, tiu ĉi lasta parolinterŝanĝo klare prezentas implican nocion, ke en iu senco nenieco ne estas negativa kvalito, sed pozitiva — manko de io estas efektive posedo de io, senigo de io efektive signifas gajnon de io.

La Folulo mem ŝuldas sian ekziston al ĝuste tiu nocio. Ĉi tie ne estas loko enplonĝi la tutan tradicion de nenieco en la Renesanco, sed helpas memori, ke la mondkoncepto de la homoj de la Renesanco multe dependis de viva konscio pri paradokso. Ekzemple, la italaj filozofoj de la dekkvina jarcento, kaj precipe Cusanus, esploris la ideon de negativa teologio: se Dio estas senfina, senlima, kaj se scio dependas de limigo, difinado, sekvas, ke ju pli oni scias des pli oni foras de la naturo de Dio. Oni komprenas Dion nur kiam oni senigas sin de la scio: kiam oni atingas »doktan senscion.« Erasmo ludis kun similaj nocioj en sia *Moriae Encomium, Laŭdo de Stulteco,* en kiu la Stulteco montriĝas pli saĝa ol la saĝeco. En la stulteco, laŭ tiu ĉi kaj aliaj epokoj, kuŝas io sankta, io dieca.

La implicojn de tiuj kaj similaj kredoj oni vidas tuj poste en la konversacio de Lear kaj la Folulo. Unuavide la vortoj de la Folulo estas plene negativaj: »Vi dispartigis vian saĝon duflanken kaj lasis nenion en la mezo... Nun vi estas nulo sen cifero. Mi statas pli bone ol vi: mi estas Folulo, vi estas nenio.«*

Sed ĝuste la »neniigo« de la reĝo, turmente doloriga procedo, preparas lin por rekonsciiĝo. Same, la emfazo je »naturo« en la unuaj scenoj preparas *nin* por la laŭstadia elpelo de la reĝo el la socio (elpelo kiun anticipas la elpelo de Kent kaj de Edgar). Revenante al la naturo, perdante iom post iom siajn cent kavalirojn, li fariĝas »nenio« — kvazaŭ pura natura fenomeno. Lia furioza kunfrontiĝo kun la tempesto simbolas samtempe la tempeston en la propra menso kaj alkroĉiĝon de la homa estaĵo al la granda kaj terura moviĝo de la universaj elementoj. Ankaŭ Lear konceptas la tempeston kiel la ĉiopovan justicon de Dio — impone, grandioze timigan. Ĝi estas samtempe kaoso kaj la Dia ordo, samtempe detruo kaj restarigo de valoroj:

Jen do mi estas, via sklavo, mi,
oldul' kaduka, povra, disdegnata.
Mi tamen devas nomi vin agentoj
servilaj. (pĝ. 71)

Servilaj, ĉar ili federiĝis kun la filinoj, sed ankaŭ servilaj, ĉar ili senkompromise eltrovas la veron:

Tremu,
vi mizerulo, ĝis nun eskapinta la juĝon pri l'ne
malkovritaj krimoj!

Kaŝiĝu, vi sangmana vi, perfida,
kaj vi, incesta simulante virton!
En pecojn disskuiĝu, vi, kanajlo,
kiu sub kovro, sub la deca ŝajno
insidis ies vivon. (pĝ. 73)

Lear kvazaŭ renkontas sin mem vidante la kurban formon de Edgar, kiu ŝajnigas frenezon por ebligi la pluvivon:

Ĉu la homo ne estas pli ol ĉi tio? Konsideru lin bone. Vi ne ŝuldas silkon al raŭpo, ledon al bovo, lanon al ŝafo, parfumon al cibetkato. Ha, tie ĉi tri el ni estas artifikitaj! Vi estas la esto mem. La neekipita homo estas ne pli ol tia kompatinda nuda forka besto, kia vi estas. For, for ĉi tiujn alpruntaĵojn! Venu, min disbutonu. (pĝ. 79)

Kaj Lear forprenas siajn vestojn.

Je tiu ĉi punkto en la edukiĝo de Lear, la bariloj de la socio, la tuta socia kadro, estas jam neniigitaj. La »neekipita« reĝo, la Folulo kaj frenezulo sidas kortume por juĝi la du filinojn: la sociaj roloj renversiĝas — la povruloj juĝas la havantojn, la subprematoj juĝas siajn subpremantojn. Partoprenante kun la mizeruloj ilian vivon, Lear lante kaj pene lernas la diferencon inter kruda naturo kaj homa naturo, kaj lernas finfine la kompaton.

La terura venĝo, kiun Cornwall praktikas je Gloucester, prezentas en strikte fizika maniero paralelon al la »epifanio,« la nekonsciiĝo de Lear. Ankaŭ Gloucester perdas sian socian rolon: lia fizika blindeco estas kvazaŭ konsekvenco de lia mensa blindeco, kiel li mem klarigas pli poste: »Mi stumblis, kiam mi vidis.« Sed rekta konsekvenco de lia blindigo estas ia »vidkapablo,« ia kompreno de la vero. Kompreneble la kompato kaj karitato de Edgar al la patro paralelas la kompaton kaj karitaton de Cordelia al Lear; kaj ambaŭ estas kvazaŭ manifestiĝoj de la sama fenomeno. La fizika blindigo de la patro Gloucester estas reprezento de la stato de la patro Lear, kaj la obscena torturo, kiun Cornwall aplikas kvazaŭ purigas la Reĝon per la suferado. Tiu ĉi intima rilato inter la du figuroj gravas en interpreto de la finaj du aktoj de la dramo. Dum Lear furiozas kontraŭ la elementoj, Gloucester, blinda, ankoraŭ ne lernis la sanktecon de la amo:

Kiel la muŝoj al petolaj knaboj,
ni estas tiel same al la dioj:
ili mortigas nin el nura sporto. (pĝ. 94)

Tio tute ne estas la lasta vorto de la dramo. Ĝi prezentas tiun mezan staton de Lear kaj Gloucester, kiam ili staras nudaj kaj ankoraŭ senkomprene antaŭ la universo. En la lastaj du aktoj ili iom post iom grimpas el tiu abismo. Estas signife, ke la Folulo malaperas el la dua duono de la dramo: li ne estas bezonata plu, ĉar Lear lernis eduki sin mem.

Ni vidas parton de tiu edukiĝo en la kvara akto, en tiu korŝira renkontiĝo inter Lear kaj Gloucester. La longa parolado de Lear pri kopulacio kaj malĉasto ankoraŭ montras konfuzon kaj necertecon en lia menso (la fakto, ke li montras ĉiujn eksterajn signojn de plena frenezeco, ne estas en si mem indiko, ke li ne parolas sencon: la frenezuloj kaj foluloj havis kvazaŭ okultan kapablon sence paroli, laŭ la Elizabetanoj), sed la spektantaro scias (kaj povas fari tiun distingon), ke »kopulacio« inter la bestoj kaj inter homoj apartenas al

---

**Eĉ la kutima nomo, kiujn foluloj uzas al siaj mastroj estas Nuncle — Oĉjo sed ankaŭ »Neniĉjo« (None-cle). Oni atentigis min, ke similan ambiguecon kaptas la Esperanta esprimo, kiu signas kaj onklecon kaj, per la nulsigno »O« nulecon.*

Grafikaĵo de István Fejes

malsamaj kategorioj, ĉar la duan regas homaj konvencioj kaj leĝoj — la homo kreis sociajn regulojn, per kiuj li difinas sin mem. Ĝuste tiu konstato kuŝas malantaŭ la parolado de Lear pli poste pri justeco, kvankam ĝi ankoraŭ ne evidentas al Lear mem:

LEAR: Ĉu vi aŭdis hundon de farmisto boji al almozulo?

GLOUCESTER: Jes, siro.

LEAR: Kaj la kreaĵon vi vidis kuri de la hundo? / Tie vi povis observi la grandan simbolon de / la aŭtoritato: hundo oficata estas obeata. / Pedel' kanajla, for la sangan manon! / Kial vi skurĝas tiun ĉi putinon? / Nudigu vian propran dorson, ege / ja vi avidas uzi ŝin por tio, / pro kio vi ŝin skurgas. Uzuristo / pendigas la fraŭdiston! Etaj kulpoj / vidiĝas tra l' ĉifoniĝintaj vestoj, / rob' kaj talaro pelta kovras ĉion. (pĝ. 113)

La parolado fine portas Lear al kompreno de la universala homeco, al kompreno de suferado kaj de subpremado. Sed kvankam ĝi subfosas la strukturon mem de la socio, ĝin kontraŭpezas la fina elemento, tiu de amo. Ĝuste kiel en sia antaŭa parolado Lear konfuziĝis pro nescio, ke Edmund perfidas kaj Edgar honestas, tiel ankaŭ ĉi tie li ankoraŭ ne renkontis Cordelia, ne renkontis la filinan amon, kiu kvazaŭ konstruas la socian ordon denove.

Eble ŝajnas strange paroli pri restarigo de socia ordo, kiam la heroo mem mortas. En tiu rilato la morto de Gloucester liveras utilan gloson. Jen kiel Edgar priskribas ĝin:

Neniam mi malkaŝis min al li,
ĝis antaŭ duonhoro, kiam mi,
armita jam, kaj ja ne certa, tamen
fidanta pri l' sukceso bona, petis
pri lia beno, Tiam mi rakontis
al li pilgrimon mian de komenco
ĝis fino. Sed nun lia kor' lezita
— ho ve, tro febla por konfliktojn tiajn
elporti! — inter du pasi-ekstremoj,
ĝoj' kaj ĉagreno, krevis dum rideto. (pĝ. 135)

Inter ĝojo kaj ĉagreno... Sama sorto atendas Lear. Li mortas ne sciante, ĉu Cordelia vivas aŭ ne vivas. Ĝis la fino liaj demandoj levas la teruran dilemon de la homo: ĉu tio, kion ni nomas »homeco« estas homa kreaĵo aŭ ĉu ĝi havas siajn radikojn en io pli vasta, io natura, ia koherigilo en la universo mem?

La fakto, ke tiu ĉi demandosigno restas kun ni ĝis la fino de la dramo, estas konsekvenco de la decido de Shakespeare ŝanĝi la finon de la tradicia historio pri Lear. Tragedioj ĉiam starigas por ni idealon, sed oferas niajn heroojn en vana klopodo atingi tiun idealon. Ĉu, do, la idealo estas iluzio, aŭ la homoj pure malfortaj? En tiu ĉi kazo, Shakespeare kvazaŭ malfermas la socion al la naturo, aŭ malfermas la homan ordon al la dia ordo (*ne* la kristana, notu: ĉar kristana dogmo kvazaŭ antaŭjuĝigus la valorojn, kiujn la dramo proponas).

Ni vidas tuj, ke tiu malfermo de la socio al valoroj ekster la socio, estas maniero pridemandi la sociajn valorojn kaj ilin redifini. Temas efektive pri la mekanismo de romanco — tiu literatura tipo, en kiu la socia ordo, kvazaŭ per miraklo, akordiĝas kun la natura kaj la dia. Ni tion vidas en du aliaj dramoj tradukitaj de Kalocsay — en *Somermeznokta Sonĝo* kaj en *La Tempesto*. Precipe la dua havas fortajn paralelojn kun Lear. Ĝi montras reganton, kiu perdis sian regon pro nekompetento, kaj eskapas en la naturon, kie, partoprenante aŭ eĉ regante la naturajn procezojn, li lernas sian rolon en la socio. En la centro de *La Tempesto* staras la amo de Ferdinando kaj Miranda; en la centro de *Sonĝo* staras la naturo mem de la amo, studo elvolviĝinta el edziĝofesto. Same en la centro de *Vintra Rakonto, Kiel Plaĉas al Vi* kaj pluraj aliaj staras ekkompreno de la naturo de amo. En *Vintra Rakonto* ĝi ankaŭ subtile interplektiĝas kun politika motivo — kiel ankaŭ, cetere, en *Antonio kaj Kleopatra*.

La romanca motivo ludas esencan rolon en la verko. Romancoj proponas repurigon, restarigon de la fruaj virtoj, reiron al la komenco, forigon de la maskoj kaj alivestadoj, kiujn la malsana socio tra sia historio postulis. Ili estas do la respondo de la kutimo al la linio de la tempo: konservativa mekanismo.

Sed en Lear ĝin kontraŭpezas la morto de Lear mem, kaj la transpreno de potenco de unu generacio al alia. *Lear* ne nur studas la ceremonion, la tradicion: ĝi frontas ankaŭ la realojn de nasko kaj morto, la neeviteblan antaŭenmarŝon de la tempoj. Tion ĝi difinas ĉefe per la konflikto de la generacioj. En tiu senco la lastaj vortoj de la dramo estas eksterordinare gravaj. Edgar diras:

The weight of this sad time we must obey;
speak what we feel, not what we ought to say.
The oldest hath borne most: we that are young
Shall never see so much, nor live so long.

Mi citis la anglan, ĉar laŭ mi la traduko de Kalocsay ne donas sufiĉan emfazon al tiu ĉi aspekto de la versoj. Jen laŭvorta traduko.

La pezon de tiu ĉi trista tempo ni devas obei,
paroli kion ni sentas, ne kion ni devus diri.
La plej aĝaj portis la plej grandan ŝarĝon: ni kiuj
junas neniam vidos tiel multon, nek vivos tiel
longe.

Per tiuj vortoj Edgar akceptas sur sin la ŝarĝon de rego kaj historio, ne kiel superulo aŭ egalulo de la pli aĝa generacio, sed kiel homo, kiu komprenas la sufe-

Giorgio Silfer

PRI LA STILO DE „MAŜINMONDO"

„Maŝinmondo", mallonga romano de Sándor Szathmári (1897—1911—1974) aperis ĉe Stafeto en 1964 (serio Beletraj Kajeroj).*

La mallonga romano „Maŝinmondo" estas la plej evidente fantazi-scienca romano en la Esperanto-literaturo: nenia dubo estas pri tio. Sed ankaŭ nenia dubo estas pri ĝia satira valoro, eĉ pli profunda ol tiu de „Vojaĝo al Kazohinio": la atenta leganto kaptas tie ĉi, ĉefe en la tria parto, la tutan filozofion de Szathmári, kun speciala rilato al la homo.

La enkonduko ne malfermas la perspektivon de tiagrada filozofiemo; en ĝi aperas nur la eksterordinara lerteco de la aŭtoro en la verva dialogo inter Wells kaj li, kun apartaj solvoj en la lingva kampo. Wells aperas ĉe Sz. el sia tempomaŝino, por komuniki, ke li legis en la estonto (do, li legontis) tre bonan artikolon verkitan de Sz. mem, surbaze de ontskribaĵo, portita de Wells el la estonto. Temas pri la situacio en la mondo antaŭ kaj tuj post la triumfo de la maŝinoj super la homaro.

Ni rimarkas la dialogan formon, verkitan kun la talento sentebla en „Budapeŝta Ekzameno": flua lingvo kaj spicaj eroj, vipantaj de tempo al tempo ian malvirton de la homoj (vidu la demandon de Sz.: ĉu vi ne povus porti al mi la verkon mem jam en sia kompleta formo? Tiuokaze mi ne devus multe labori . . . kaj la pikan respondon de Wells, kontraŭ la laikaj fuŝfilozofoj, ks), kaj jam tiu absurdeco de la cirkonstancoj, kiuj tamen gardas ian nedifineblan logikon, samtempe groteskan, angoran kaj komikan.

Antaŭ tia absurdeco ni tuj memoras pri alia eksterordinara teatroverkisto, irlandano Samuel Beckett; tamen la absurdo-teatro de Beckett havas alian tension, kiu kaptas en rapida vortico eĉ la voĉan esprimilon: la lingvo, la vortoj iom post iom perdas sian konsiston, restas ĉiam pli hermetika dialogo en ĉiam pli dezerta sceno, ĝis la agoj mem sufiĉas por esprimi la sekan, amaran humuron de la verŝajno (Senvorta akto, 1957).

Male, la sperto de Sz. ignoras la pantomimon: por liaj roluloj la parolata lingvo restas esenca trajto de la personeco. Precipe en la enkondukaj linioj de „Maŝinmondo", kie aperas alia novaĵo: Sz. mem estas la protagonisto, kaj li stariĝas ĉe Wells, kvazaŭ Dante ĉe sia majstro Vergilio, antaŭ ol esplori kaj priskribi misteran realaĵon. Kaj per tiu kunestado, Sz. ŝajnas mem proponi sankcion pri sia rolo de plej eminenta scienc-fikcia verkisto: la majstro elektis lin, por transdoni tiel gravan mesaĝon kiel la kulturhistorio de la maŝinmondo, kaj li rajtas eniri la Parnason por sidi apud siaj grandaj modeloj; atendas lin Swift, kiu permesis utiligi Guliveron por „Kazohinio", atendas lin Madách, kiu instruis al li la universalecon de la homa tragedio, atendas lin Anatole France, kiu regalis lin per eleganta ciniko dum skurĝado de la homaj stereotipoj, atendas lin la granda Karinthy, kiu inicis lin al la gusto de la proza prezento.

La dua parto de la romano, kiu entenas la esperantigitan raporton el la estonto (jes, ĉar la maŝino *kompilontis* ĝin en la hungara, laŭ aserto de Sz. mem), estas la kerno de la verko. Nun la dialogoj



Grafikaĵo el la revuo „Galaktika"

---

ron de la vivo kaj la teruran pezon de la regado. Sed „ni, kiuj junas, *neniam* vidos tiel multon, nek vivos tiel longe." Kial? Ĉar la forto de la mito ne trafas la ĉiutagan vivon. Lear kaj la sorto de Lear fariĝis simbolo al la ĉiutageco, kaj per tio kvazaŭ pasis el la historio en la ĉiamon.

La forto de la mito kuŝas ne en heroeco, nek en homeco, sed en kombino de la du. *Lear* estas dramo same pri la grandaj faroj de la historio kaj pri la simplaj kvereloj, kiuj okazas ĉiutage en ordinaraj familioj kaj inter ordinaraj homoj. Lear estas mizera oldulo eljetita el sia domo, sed li estas homo de mirinda fizika forteco („La sklavon, kiu tie ŝin strangolis, mortigis mi"), li estas homo, kiu komunikas kun la ŝtormoj — kaj li estas la homa ofero, la bruligita sankta dono, kies morto ebligas la teruran sed gloran antaŭeniron de la historio. Tiu konstato estis eksterordinare grava por la Elizabetana kaj Jakobana epoko, sed ĝi ankaŭ havas universalan kaj modernan validon. Se per unu frazo oni povus resumi la dramon, tiu frazo konstatus, ke la historio fariĝas alfrontebla nur per la potenco de la amo — sed ke la amo, eĉ se ĝi liveras kadrojn por la brido de la historio, neniam povas venki la tempojn.

ne ludas ĉefan rolon, kaj eĉ la lingvo ŝanĝiĝas. Tie ĉi Sz. plej mirinde uzas la econ de Esperanto en mekanika parolmaniero: per akre taŭgaj vortumoj li kapablas paŭsi la cibernetikecon de la komputera lingvaĵo. La kontrasto estas klara, eĉ en la signifo de kelkaj vortoj: kaj Sz. atentigas pri tio, listigante kelkajn miskomprenojn faritajn de la maŝino (konfuzo inter militestro-buĉisto, advokato-komplico, parlamento-kabaredo, ktp), kvankam ĝuste tiu ĉi alineo, pro la troa evidenteco de la satiremo, perdas sian mordecon kaj eĉ ŝajnas al mi febla punkto, iom ne sukcesinta kunkudro de la enkonduko kaj la ĉefa korpo de la romano.

Romano, kiu ja marŝas laŭ siaj reloj, rapide kaj konsekvence. La lingvaĵo perdas iom post iom sian akrecon, ĝi ja mildiĝas pro la enscenigo de la homoj, la lasta generacio antaŭ la diktaturo de la maŝinoj. En tiu ĉi momento Sz. plej libere kaj feliĉe satiras, dum la premo de la eventoj sufokas ĉiun perspektivon por la pretervivo de la homaro. Kaj al la iompostioma supereco de la maŝinoj Sz. aldonas la frapojn de sia vipo.

Estus tro longe detaligi ĉiun eron de tiu satiro, kunfandanta logikon kaj angoron, nekredeblon kaj realon. Nur unu aferon mi diru: Sz. lerte evitis grandan danĝeron — li povis droni antaŭ la vasteco de sia intenco (rakonti la lastajn tagojn de la tuta homaro), sed li sukcesis konkludi ĉion plej brile. Eble la rakonto ŝajnas tro strikta, tro unudirekta; kaj samtempe oni ne povus kompreni la apartecon de la epizodoj, kiel tiu de la kokrita deputito; tamen nenio estas akcesora en la tuto, kaj la tuton akceptigas la ruza rimedo ĉe la enkonduko: la aŭtoro ja ne verkis, li nur kopiis la tradukitan manuskripton, la *ontskribaĵon*.

Al la plaĉo de la mezo postvenas la filozofio de la konkludo. Wells revizitas sian disĉiplon, kaj post renovigo de la lingvaj ludoj pri est/ont/int/anto, el kiuj fontas kromaj elementoj de politika satiro (neniam unudirekta, ĉiam ĝenerale kontraŭ la establosistemoj aŭ, pli sincere, kontraŭ la homoj), per la buŝo de Wells Sz. anoncas sian mesaĝon, kiu rondiras ĉirkaŭ la sentenco:

„Kio estas racio? La kredo, ke la ekstera mondo konformas al nia fantazio!"

Sz., startinte el la kontestebla (kaj fakte science falsa, sed li ankoraŭ ne eksciis tion) opinio, ke la maŝino povas havi kapablojn pli vastajn kaj komplikajn ol la cerbo de la homo mem, volas detrui la objektivecon de la homa mondo, iri al realaĵo kaŝita malantaŭ la modeligo de la racio. Li direktas sian babiladon al senmateria vivo, sed tie ĉi li haltas. Eĉ la lingvorimedoj senkonsistiĝas: la satira dialogo iĝis monologo de Wells, la rakonto iĝis verva pritraktaĵo, tamen ĉesanta antaŭ io neperceptebla fare de nia tridimensia cerbo.

Iasence, per tiu ĉi libro Sz. serĉas lokon, kaj probable li trovus, se la diverseco de la partoj ne spitus la unuecon de la romano, apud kelkaj eminentaj mensoj, ne nur en sciencfikcio. Temas pri identiĝo kun tiu penskurento, kiu en la plej diversaj kampoj influas la ĉi-jarcentan Eŭropan kulturon: la kontribuo de Schopenhauer, en filozofio, de Pirandello, en teatro, de Einstein, en scienco, fakte modifas la perspektivon — la leĝoj de la naturo ne estas ekster ni, eble ili tute ne ekzistas, ni konformigas la realon al tiu dimensio, kiun nia cerbo, nia racio konas, sed tio povas ne esti la vero.

La aliĝo al subjektivismo bone komprenigas la izolon de Sz.: la Eŭropa kulturo, kaj okcidente kaj oriente, vivis ĉiam (kun malmultaj esceptoj, eĉ en la mezepoko) sur la fundamento de objektivismo. La religioj, la pozitiva scienco, dialektika materiismo spitas tiajn konceptojn. Kaj Sz. ĝuste estis nek religiema, nek marksisto; kio ĵetas ombron sur lian politikan sintenon (fakte ne interesan, laŭ estetika vidpunkto) kaj bone klarigas lian serenan mizantropecon.

Mizantropeco, ja evidenta en grava akcesoraĵo: „Maŝinmondo" ne havas infanojn, la kulturhistorio de disfalonta mondo ne povas akcepti la esperojn kaj la penojn por nova generacio.

***la tri datoj post la nomo de E-literaturisto indikas laŭvice naskiĝjaron, esperantiĝon, mortjaron.**

Albert Goodheir

ARMADA

Rakont' insulana:
„Dum kvarcent jaroj
kuŝas ŝipo hispana
apud tiu roko.
En kanon' mia avo
kaptis omaron.
Forgesita la loko;
ĉion kovras sablo."

MORTO EN HOSPITALO

Nun li forestas,
la maljunulo, la vilaĝpoŝtisto.
Kiam post libertago mi revenis
alia homo kuŝis en la lito,
kaj mi memoras la gaelan voĉon,
kiu ripetis dum semajnoj
plurfoje ĉiutage
la nomon, fakton,
kaj solan glormomenton,
kiel faris piramidon faraono,
trompan remparon kontraŭ neniiĝo:
„mi estas Donald Campbell, mi naskiĝis
je la mil okcent okdek sesa jaro
sur la insulo Ling;
edziĝis mi en la Granda Hotelo,
Sauchiehall Strato, Glasgovo."

(El *Merlo sur Menhiro)*



VOPA-pasto el ok ovoj:

VOSZK

Garantias ok kokinoj

Paston de nivelo alta

Pri studentoj-esperantistoj de Szombathely-a Pedagogia Altlernejo

Nia tiel nomata fakdona kolegio funkcias ĉe la katedro pri rusa lingvo kaj literaturo de nia altlernejo. La katedrestro, Mihály ERDEI mem rekonas la gravecon de Esperanto, alte taksas ankaŭ ĝian valoron kiel „bazo por plua lingvolernado". Antaŭ du jaroj, li, per sia decidrajto permesis, ke en la plejparto de miaj studhoroj mi instruu Esperanton.

La unuaj du kursoj de la fakdona kolegio kaj kelkaj studentoj el fakultativa E-kurso laboras en scienca studentrondo. Ĉar ili instruos ĉefe lernantojn de la unuaj kvar klasoj, ili preparas ludilojn, per kiuj oni povas fari plejeble distra la lernomaterialon. Tia ludilo estas ekzemple la vortpariga kartaro „Aĉa krokodilo". Sur karto-paroj estas skribitaj ekvivalentaj vortoj, esprimoj en la hungara lingvo kaj en Esperanto. Estas unu sola senpara karto, kun surskribo „Aĉa krokodilo". Kiu ĝin fine havas, estas la venkito. Evidente, sufiĉas pasive rekoni la vortojn. Ĉe alia ludo, kies ilo estas „fraziga kartaro", el numeritaj kartoj (ekzemple 1 ĉiam estas subjekto, 2 predikato, 3 aŭ 3/a objekto, 3/b adjekto ktp.) oni devas kompili plejeble longajn frazojn. La gajnebleco kvadrate kreskas: por dukarta frazo oni ricevas 4, por trikarta 3x3=9, por kvarkarta (4x4=)16 punktojn. Ni faris societajn ludilojn, ke „laŭ ĵetado" oni progresas al celo, trovante kelkloke „esperantajn obstaklojn", taskojn, enigmojn.

Ni kompilis enkondukan magnetofonan materialon por la lernolibro *Esperanto I* de d-ro I. Szerdahelyi, kun akompanaj projekciataj bildoj.

En nia unua jaro, printempe de 1974, ok studentoj de nia instituto partoprenis Duan Konferencon kaj Renkontiĝon de Sciencaj Studentrondoj pri Esperanto. En 1975, kiam nia studentrondo, apogate de la katedrestro, sukcesis organizi Trian Landan Konferencon de Studentoj-Esperantistoj, jam grave laboris ankaŭ la novaj unua-kursanoj. Krom partopreno en la kompilado de la ĵus priskribita materialo ili dum la konferenco prezentis literaturan programon. Studentoj de la dua kurso aranĝis la Esperanto-lingvajn programojn de niaj korusoj, de la instituta pop-muzika ensemblo, de ensemblo de Gyula Kelemen el Zalaegerszeg kaj de nia eminenta popolmuzikisto-studento Lajos Németh. Jolán Rajos, frekventinta fakultativan kurson de Esperanto, kun siaj disĉipletoj prezentis pupteatraĵon en Esperanto, kun titolo „Mi devus ekiri, edzinon akiri". Nepre prezentindas el niaj studentoj ankaŭ Pál Farkas, desegninto de niaj projekciaj bildoj.

Dum la konferenco ĉiu studento povis kontaktiĝi, interamikiĝi kun studentoj-esperantistoj el Budapeŝto, Esztergom, Sárospatak, dume kaj sekve ili ekhavis novajn ideojn por laboro. Laŭ modelo de studentinoj de János Prunkl el Esztergom (kaj laŭ la konsilo de la poetino Judit Estók) nia studentrondo okupiĝos ankaŭ pri historio de Esperanto; ni aliĝos ankaŭ al la laboro de la Budapeŝtaj studentoj, kompilantaj lingvistikan (klarigan) terminaron. Feliĉe, inter ni estas pluraj rusistoj, bone uzontaj la rusan fakliteraturon.

Nia rondo klopodas ankaŭ „ripozi" por Esperanto. Pasintsomere ni kun pola studenta grupo vojaĝis semajnon en Hungario, semajnon en Pollando. Espereble ankaŭ alifoje kaj aliloke ni renkontiĝos kun niaj ŝatataj Reŝovaj amikoj. Ĉi-jare ni tendumos en Slovakio, en Lanĉov.

Mi pensas, ke kaj nian nunan agadon, kaj niajn pluajn eblojn karakterizas *multflankeco*. Tio estas sekvo de la strukturo de la altlernejo, en kiu ni laboras. En nia instituto oni preparas instruistojn de la *unuaj kvar* klasoj (ili estas ĝeneralaj instruistoj kaj pri unu lernobjekto — laŭ ilia fakdona kolegio — fakinstruistoj). Oni preparas instruistojn de *superaj* (5—8-a) klasoj pri po du lernobjekto. Lernas ĉe ni ankaŭ estontaj bibliotekistoj kaj popolklerigistoj. Ekzistas ankaŭ katedro de desegnado, de muziko-kantado, de matematiko, ktp., do oni povas uzigi Esperanton diverskampe. Ekzemple, dum la menciita konferenco nia studentino Rozalia Molnár prelegis en la internacia lingvo pri la historio de la hungara pentrarto, niaj kantistoj kantis en Esperanto kaj nur pro tempomanko ni ne organizis matĉon. Ni havas eblon kunlabori kun plej diversaj junaj specialistoj, por kiuj nia pli vasta *publiko* igas interesa mem la lingvon.

En nia urbo Szombathely estas diversaj junularaj kluboj. En la septembre komencota studjaro niaj rondanoj provos organizi por ili kursojn kaj studos la metodojn de la enkluba instrulaboro. Ĉar en Hungario nuntempe la laboro de kulturdomoj estas malpli strikte difinita, pli libera ol la laboro de lernejoj, ni provos varbi plejeble multe da studentoj de popolklerigo. Mi, se eblos, komencos por ili specialan seminarion; ilia konata aktivemo certe rezultigos novajn kampojn ankaŭ en la laboro de la scienca studentrondo.

Nia direktoro, László Szalay, multe klopodis por konvena teknika ekipo de la instituto. Jen, pro kio ni povas jam atenti kaj okupiĝi pri metodoj de la lingvoinstruado per ekipaĵo, kiu videblas sur nia foto pri fakultativa Esperanto-kurso.

Balázs *Wacha*

Lingva ĉambrego de Pedagogia Altlernejo en Szombathely



LETERKESTO

El nia plenplena leterkesto antaŭ ĉio ni plenumas la peton de Stanislaw Migielski (ul. Piramowicza 36, 47—200 Kozle, Pollando), publikigante lian deziron ricevi nacilingve eldonitajn verkojn de la pola klasikulo H. Sienkiewicz. La libroj estas bezonataj por lerneja muzeo pri Sienkiewicz, kaj ĉiuj sendotaj libroj estos rekompencitaj per esperantaj libroj, eldonitaj en Pollando.

Al s-ro Michael Behr (Koburgerstrasse 83, Markkleeberg, GDR—7113) kun bedaŭro ni devas informi, ke la malnovaj numeroj de nia revuo, pritraktantaj esperantajn temojn, praktike ĉiuj elĉerpigis.

S-ro Martin Schüler (1532 Kleinmachnow, Heidefeld 32, GDR) skribas: „Kiel proponon por nova rubriko mi volas sugesti al vi preni hungarajn proverbojn aŭ parolturnojn, traduki ilin laŭvorte en Esperanton, doni klarigojn pri la deveno, kaj fine la ekvivalenton en la Internacia Lingvo."

S-ro Jürgen Berndt (8020 Dresden, Räknitzhöhe 74, DDR) skribas, ke en nia revuo pleje kaptas lin artikoloj pri geografiaj temoj. Speciale kontentigis lin la artikoloj pri Sopron kaj tiu pri la rezervado de akvo en Hungario.

S-ro Talis Bereis (USSR, Latvio, Riga—226018, str. Krasta 5—33), studento de la elektroenergia fakultato de la Politeknika Instituto en Riga reagas al nia „Studenta paĝo". Li raportas, ke en lia instituto antaŭnelonge estis defendita la unua priesperanta diplomlaboro „La evoluo de ideoj pri planlingvoj". Ni bedaŭras, ke li forgesis skribi la nomon de la aŭtorino de la disertaĵo. Li mem preparas sciencan referaton pri la temo „La rolo de lingvo en la disvolvo de internaciaj junularaj kontaktoj", por ĉijara sciencteknika konferenco. Li volas legi en nia revuo ankaŭ pri tio, kiajn sciencajn studojn verkis lastatempe hungaraj studentoj.

Korespondi deziras

POLLANDO: S-ro Józef Gasiorowski, ul. Wybickiego 82, 87—100 TORUN; F-ino Beata Bieniek (14-jara), Przemyslów 4, 99—441 Zlaków Koscielny, voj. Skierniewice; F-ino Halina Szczurek, ul. Glowackiego 17, 37—410 Ulanów.

S-ro Wincenty Andrysaik, str. Kruczkowskiego 5 m 14, 58—309 Walbrzych skr. poczt. 303. S-ro Ryszard Zwierz, 05—314 Halinów, ul. Warszawska 20, voj. Warszawskie.

SOVETUNIO: F-ino Janjo Voronina (290022—LVOV—22, Jerceskoba str. 7. 45.) deziras korespondi unuavice kun samideanoj el Jugoslavio.

Albert Goodheir

PANTUNOJ*

Inter muroj dum tago pala
„Ĉie gasto, hejme nenie."
Sur insulo en vento sala
„Sen iu mastro, hejme ĉie."

El nebulo sur montopinto
rojo rompas kun ondobruo.
Ĝoje mi frontas oldon, vintron;
fine maro, hodiaŭ fluo.

Ĉielarko de mont' al maro;
sube en lumo kuŝas urbo.
Korvakuon traarkas fajro;
melodias la taga turbo.

Sur rokkresto en verda ondo
vico da kormoranoj atendas.
Memkompato frostigas koron;
venkas morno kiam mi plendas.

Lumpavime l' irlanda maro
pace plaŭdas sub Oriono.
Landojn pavimas sangspuraro;
Babilono ĝis Pentagono.

(El *Merlo sur Menhiro*)

**Malaja versformo.*

Emeljanenko Aleksandro (16-jara), (Jalgar—2, Mendelejeva 16. kv. 8. Kazaha SR) deziras korespondi pri matematiko, ŝako, pm., bk.

Janna Muĥumova (14-jara), (Jalgar—483310, Beregovaja 80, Kazaha SR) pri muziko, pm., bk.

Majer Alonka (15-jara), (Jalgar—483310, Bajkalskaja 35—5, Kazaha SR) pri sporto, bildkartoj kun floroj, pm.

Movĉan Larisa (15-jara), (Jalgar—2, 483310, ul. Mendelejeva 5, kv. 4, Kazaha SR) kolektas bildkartojn kun katidoj, infanoj kaj urboj, pm., kaj interesigas pri junlara muziko.

Jalgas Salauatoviĉ (16-jara), (Jalgar—483310, Beregovaja 80, Kazah SR) pri matematiko, sporto, muziko.

Alvoko!

Dum la Somera Esperanto-Universitato (en urbo GYULA), la Teritoria Esperanto- Komitato organizos A kaj B nivelajn ekzamenojn. Vian aliĝon bonvolu sendi al TEK 5701 GYULA, pk. 73.

Transilvania Hungara Vorthistoria Kolektaĵo

Duonjarcenta vorthistoria esplorado, unu miliono da prilaboritaj hungarlingvaj arkivaj indikoj: jen tio karakterizas tiun grandegan lingvistikan kaj folkloristan laboron de *T. Attila Szabó* en Transilvanio (en Rumanio). La unuan volumon de tiu ĉi vivoverko aperigis la Libroeldonejo Kritérion en 1975. sub titolo: *„Erdélyi Magyar Szótörténeti Tár"*. El la tuta kolektaĵo estas eldoneblaj ankoraŭ ses-sep volumoj. La verkon kun granda plezuro povas foliumadi ĉiuj, kiujn interesas la historio de la Transilvania hungara lingvo kaj ĝia evoluo en la lastaj kvar jarcentoj. Konsiderinda estas ankaŭ la internacia signifo de tiu ĉi verko, ĉar en ĝi la vortoj estas legeblaj en hungara, rumana kaj germana lingvoj. La preciza aludo al la arkiva fonto, la fakeca interpreto plifaciligas la laboron de tiuj, kiuj okupas sin pri la transilvania hungara skriba lingvo. Ni esperas, ke la unuan volumon baldaŭ sekvas ankaŭ la aliaj.

F. J.

RECENZO

Konisi Gaku: *La kosmoŝipo „Edeno n-ro 5"*.

Scienc-fikciaj rakontoj. Eld.: Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj. Kansai (Japanio), 1971. 46 p. 13,5x20,5 cm. Broŝurita. Prezo: ned. gld. 2,20.

Certe al multaj inter niaj legantoj frapas la okulojn la eldonjaro de tiu ĉi libro. 1971? Ĉu temas pri preseraro? Ne. *La kosmoŝipo „Edeno n-ro 5"* vere aperis antaŭ kvar jaroj, tamen ni ne hezitas recenzi ĝin, ĉar temas pri libro valora, en sia speco preskaŭ unika en nia literaturo. Bedaŭrinde, siatempe nia redakcio ne ricevis recenzekzempleron, tamen, tio ne povas esti kaŭzo preteratenti por ĉiam libron recenzindan. Ni intencas agi same koncerne la plej atentindajn aperaĵojn (precipe originalajn) de la lastaj jaroj.

La scienca fikcio estas ĝenro furoranta en la mondo. Kiel ĉiu alia ĝenro, ankaŭ tiu ĉi havas sian kremon kaj balaaĵon. En la Esperanta literaturo sciencaj fikcioj ne abundas, tamen, pri la kvalito ni povas esti kontentaj: la malmultaj originalaj verkoj, kiuj aperis ĝis nun en tiu ĉi branĉo, krom iuj esceptoj ĉiam klopodis eviti la vojon de la facila sukceso kaj eluzis la filozofiajn kaj socikritikajn eblaĵojn de la ĝenro.

La jenaj kvin rakontoj de Konisi Gaku certe jam akiris kaj ankoraŭ akiros agrablajn horojn al la ŝatantoj de la sciencaj fantaziaĵoj. En neniu rakonto li kontentiĝas per nura teknikprognozo, lin interesas la homaj elementoj de la teknika progreso, ĝiaj postsekvoj por la homo. Ĉiuj rakontoj estas verkitaj atentostreĉe, en neniu el ili mankas originala, surpriza ideo, kaj tre verŝajne pluraj el ili — precipe la plej sukcesinta *Elizeo* — estos tradukitaj al naciaj lingvoj.

La stilo de la rakontoj — krom kelkaj malgravaj stumbletoj — estas senriproĉa, kaj rekomendante ĝin mi ne plenumas rutinan devon, sed eldiras vive spontanean sugeston.

V. B.

Humuro

Renkontiĝo. Du fenomenaj pensdivenistoj renkontiĝas. Unu el ili diras:

— Mi ĝojas, kara kolego, ke vi fartas tiel bone. Kaj diru, kiel do fartas mi?

Eraro. — Kio estas la plej granda eraro en la vivo de ofica ĉefo?

— Se li edzinigas sian maŝinskribistinon kaj pensas, ke ankaŭ plue li povos al ŝi dikti.

Kuraco. La kuracisto transdonas la recepton al la paciento kaj diras:

— Krome, vi devas ankaŭ promeni almenaŭ du horojn ĉiutage.

— Ĉu antaŭ aŭ post mia labortempo? — demandas la paciento. — Mi estas nome leterportisto.

Espero. Ĉu vi estas la nova tajpistino de mia edzo?

— Jes.

— Mi esperas, ke vi ne estos tiel agresiva kiel la antaŭa.

— Kiu do estis tiu antaŭa?

— Mi.

Suspekto. Skoto donis al sia filo unu ŝilingon, kiomfoje ĉi tiu ricevis en la lernejo la noton „eminenta". Kaj jen, la filo ricevis nurajn bonegajn notojn. Fine la patro demandis kun suspekto:

— Diru, filo, sed sincere, ĉu vi ne dividas tiun monon kun la instruisto?

Kalendaro

1896—04—08 Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Alfred SCHAUHUBER, aŭstra Esperanto-verkisto. Liaj poemoj aperis en la volumo „Dekdu poetoj".

1961—04—12 Antaŭ 15 jaroj veturis la unuan fojon homo en la spaco: Jurij GAGARIN, soveta astronaŭto.

1886—04—14 Antaŭ 90 jaroj naskiĝis Árpád TÓTH, hungara poeto. Vidu HV 63/3.; 64/1. kaj 68/3.

1906—04—19 Antaŭ 70 jaroj mortis Pierre CURIE, Nobel-premiita franca fizikisto.

1906—04—23 Antaŭ 70 jaroj mortis Henrik IBSEN, norvega realisma dramverkisto.

1896—04—23 Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Máté ZALKA, hungara verkisto, elstara batalanto de la hungara kaj internacia laborista movadoj. Vidu HV 61/2.

1866—04—25 Antaŭ 110 jaroj naskiĝis D-ro Carlo BOURLET, franca profesoro kaj scienculo, elstara figuro de la franca Esperanto movado.

1901—04—28 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis László NÉMETH, hungara verkisto. Vidu HV 71/1.

1901—05—01 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Antal SZERB, hungara verkisto. Vidu HV 64/1.

1846—05—05 Antaŭ 130 jaroj naskiĝis Henryk SIENKIEWICZ, Nobelpremiita pola verkisto.

1776—05—07 Antaŭ 200 jaroj naskiĝis Dániel BERZSENYI, hungara poeto.

1896—05—11 Antaŭ 80 jaroj naskiĝis Hilda DRESEN, estona Esperanto-verkistino. Vidu HV 66/4 kaj 69/2.

1876—05—20 Antaŭ 100 jaroj mortis Hristo BOTEV, bulgara verkisto.

1876—05—30 Antaŭ 100 jaroj naskiĝis András FÁY, hungara fabelverkisto. Vidu HV 65/3.

Komp. L. Rieth

Paĝo de FERI'

ATENTINDA KONSTATO



En la kadraj vicoj de nia enigmo ni citas opinion de Albert EINSTEIN (1879—1955) Nobel-premiita germana fizikisto. Ensendi sufiĉas nur la citaĵon ĝis la 30-a de julio Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. Unua vico de la citaĵo, daŭrigo en la 14. vico vertikala. 14. Juvelŝtono (Radiko). 15. Rilata al unu el la federaciaj respublikoj de Jugoslavio. 16. Sidiĝo. 17. Interna tera aŭ masonaĵa deklivo de fosaĵo aŭ fortikaĵo (artikolo kaj radiko). 18. Malgranda rabobesto, kun naĝhaŭto inter la piedfingroj, vivanta ĉe akvo kaj manĝanta fiŝojn. 19. Publika ĝardena promenejo. 20. Subtera ĉambro, en kiu oni konservas vinon (R). 21. Vojo en parko. 22. Tute rapide kaj neatendite okazanta (R). 23. Mezuro de longo, unu dekduono de colo aŭ 2,256 mm. (R). 24. Mezo de fiolo! 25. Samaj pluralaj personaj pronomoj, la dua en akuzativo. 26. Tiaj, kies manĝo-bezonoj estas kvietigitaj. 27. DJ. 28. Tabelvorto. 29. Kreskaĵo, kies frukton manĝis laŭ la Biblio Adamo kaj Eva (R). 30. Trempus iun en akvon. 31. Anoj de la ĉefgento loĝanta en plej granda popoldemokratia respubliko. 32. Estiĝis, fariĝis en iu loko, aŭ momento. 34. Titolo de la japana imperiestro (R). 35. Stano. 36. ...ro: kolekto da aktoj, dokumentoj. 37. Frapis. 38. HUA. 39. Abstraktaĵo, konsiderata kiel reala ekzistaĵo. 40. Metis en ies posedon. 41. Bastono, atributo de Bakĥo kaj Menadoj (R). 42. LSA. 43. Virnomo. 44. Fizika, materia spaco. 45. Artefarita aerfluo en fornoj. 47. Helena duondio, simbolo de la bonfara fortego (R). 48. Rilata al la ruĝhaŭtaj triboj indiĝenaj en Ameriko. 49. Soveta astronaŭto (Sojuz—4 kaj Sojuz —8).

VERTIKALAJ VICOJ: 2. Hungara popolgrupo vivanta en Transilvanio. 3. Lento-forma bombono (R). 4. Titolo de guberniestroj aŭ princoj en islamaj landoj. 5. Ronda disko, turniĝanta ĉirkaŭ akso. 6. Apartenanto al iu grupo. 7. NT. 8. Porcelana aŭ metala ovoforma blovinstrumento (R). 9. Rigidigi, malmoligi kaj ŝveligi per alfluo de sango (R). 10. Ss — prononcite. 11. Ĝiri (R). 12. Tiuj kontraŭ kiuj oni komencis batalon. 13. Aro de laŭtegaj avertiloj (R). 17. Suba lipo de labiata korolo. 19. Kaŭzis al iu suferon, kompenzante ties kulpon. 22. Trigonometria rilato (R). 23. La vestmaniero (artikolo kaj radiko). 25. En nenia loko. 26. Donas aŭdeblan aervibradon. 28. Membro de la Hitlera nacisocialisma partio. 29. Vundis per pinta ilo. 30. Hibride. 31. Tio, kiu situas proksime al mi. 33. Havi la saman opinion (R). 34. Foresto de io, necesa por kompleteco. 35. Rusa realisma pentristo (1848—1916). 37. Franca filozofo (1851—1917), prezidanto de la I. Esperanto Kongreso en Bulonjo ĉe Maro. 38. Hispana nobelo (R). 40. Rivero en Jugoslavio. 41. Loĝanto de nia planedo (R). 43. Malgrandan. 44. Doni difinitan lokon al objekto. 46. Mezo de foiro! 47. Granda publika ĉambrego (R). 49. Duono de ŝalo!

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 75/6 estas:

„En nigra vivmagio bonaj sorĉoj,
en vojoperda svaga vag' vi estas
vojmontre allumantaj sanktaj torĉoj!"

Libropremion gajnis: Linde Knöschke kaj D-ro Karl Schulze el GDR, János Doktor el Hungario.

Atentu! En nia sekvonta numero ni publikigos konkursan enigmon. La ensendontoj de ties ĝusta solvo ricevos apartajn valorajn premiojn. Partoprenu en la ludo ĉiu nia leganto!

Lingvaj Ludoj

Nun ni prezentas la malnovan ludon, nomata a n a g r a m o. Tamen ni devas pli precizigi la difinon de PIV pri anagramo: vorto eltirita el alia vorto per alivicigo de la literoj — aldonante, ke anagramon oni povas fari ne nur el vortoj, sed ankaŭ el nomoj kaj el kompletaj frazoj. *Ĉefa kondiĉo, ke oni devas uzi ties ĉiujn literojn, sen restaĵo!* (La difino de PIV validas nur por *anagramoidoj*, pri kiuj ni okupiĝos alifoje).

Anstataŭ citi nacilingvajn (cetere jam konatajn) ni prezentas kelkajn Esperant-lingvajn, de ni kreitajn anagramojn.

Ekzemple el la nomo de IVO LAPENNA: *Ivano Plena, Ne naiva pol', Nepala vino, Pala nevino.* El la poemtitolo de Julio BAGHY „La mar' furiozas", ni donas por ekzemplo: *Farmulo razias, La maro rifuzas, Mi, Lazaro farus, Rara muzo falis, Ruza faro limas* kaj *Ruza rasa filmo.*

Do ek al laboro! Sendu al ni similajn anagramojn kreitajn el la literoj de konataj esperantistoj (sen restaĵo, do uzante ĉiujn literojn de la nomo), kondiĉo estas, ke la anagramo konstruita ne estu ofenda al la persono per kies nomo vi ludas.

Same sendu anagramojn eltiritajn el la literoj de titoloj de Esperanto libroj kaj poemoj. La plej bonajn anagramojn ni publikigos kaj donacos per libroj.

LA PERANTOJ DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

AUSTRIO: GLOBUS (VAZ) Höchstädtplatz 3, 1200 WIEN XX.,

AUSTRALIO: C.B.D. LIBRARY AND SUBS. SERVICE, Box 4886, G. P.O. SYDNEY, N.S.W. 2000

COSMOS BOOKSHOP, 145 Ackland Street, ST. KILDA 3182 READ AND CO., 694—696 George Street, SYDNEY N. S.W. 2000

BELGIO: AGENCE MESSAGERIE DE LA PRESSE, 1 Rue de la Petit-Ile 1070 BRUXELLES

OFFICE INTERNATIONAL DE LIBRAIRIE S. A., Avenue Marnix 30, 1050 BRUXELLES

BRAZILIO: LIVRARIA D. LANDY LTDA, Caixa Postal 7943, 0100 SAO PAULO

BRITIO: BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 140 Holland Park Ave., LONDON W11 4UF

COLLET'S HOLDINGS LTD., Denington Estate, WELLINGBOROUGH, Northants NN8 2QT

THE DANUBIA BOOK COMPANY, 58. Chatswort Road, LONDON NW2 4DD

BULGARIO: DIREKZIA REP, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: MAĎARSKA KULTURA, Narodni Třida 22, 115 66 PRAHA I.

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tisku, Vinohradská 46 PRAHA

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tlace, Leningrádská 14, BRATISLAVA

ĈINIO: CNPICOR, P.O.B. Nr. 88, PEKING

DANLANDO: MUNKSGAARD'S BOGHANDEL, Norregade 6, 1165 KOBENHAVN K.

FINNLANDO: AKATEEMINEN KIRJAKAUPPA, Keskuskatu 2, 00100 HELSINKI 10.

FRANCIO: AGENCE LITTERAIRE ET ARTISTIQUE PARISIENNE, 23 Rue Royale, PARIS 8.

SOCIÉTÉ BALATON, 12 Rue de la Grange Bateliere, 75 PARIS IXe

G.D.R.: ZEITUNGSVERTRIEBSAMT, Strasse den Pariser Kommune 3—4, 1004 BERLIN

G.F.R.: VERLAG Hans LEIPNITZ, Hölderlinstrasse 10, 6 FRANKFURT 1.

H.W.E. SAARBACH GMBH, P.O.B. 101610, 5 KÖLN 1.

HINDIO: NATIONAL BOOK AGENCY PRIVATE LTD., 12 Bankim Chatterjee Street, CALCUTTA

ISRAELO: LEPAC LTD., 15 RAMBAM Str., TELAVIV

ITALIO: LIBRERIA COMMISSIONARIA SANSONI, Via Lamarmora 45, Casella Postale 552, 50121 FIRENZE

SO. CO. LIB. RI., Piazza Margana 33, 00186 ROMA

JAPANIO: MARUZEN CO. LTD., P. O. Box 5050 TOKYO INTERNATIONAL, 100—31.

NAUKA LTD., 2—30—19 Minami-Ikebokoro, Toshima-ku, TOKYO 171.

JUGOSLAVIO: JUGOSLOVENSKA KNJIGA, Terazije 27, BEOGRAD

PROSVETA EXPORT—IMPORT, P.O.B. 555, Terazije 16/1, 11001 BEOGRAD

KANADO: PANNONIA BOOKS P.O. Box 1017, Postal Station „B" TORONTO Ont. M5T 2T8

DÉLIBÁB FILM AND RECORDS STUDIO, 19 Prince Arthur Street west, MONTREAL 130 P.Q.

KOREO: „CHUIL U", PHENJAN

KUBO: INSTITUTO CUBANO DEL LIBRO, Obispo 461, HABANA

NEDERLANDO: UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002

NORVEGIO: A/S NARVESENS LITTERATURTJENESTE, Box. 6140, OSLO 6.

POLLANDO: B. K.W.Z. RUCH, ul. WRONIA 23, 00—840 WARSZAWA

RUMANIO: D.E.P. BUCURESTI

D.E.P. ARAD

SOVETUNIO: POCHTAMT—IMPORT, MOSKVA

POCHTAMT—IMPORT, LENINGRAD

SVEDIO: NORDISKA BOKHANDELN, Alströmergatan 22, 101—10 STOCKHOLM

SVISLANDO: AZED AG. Dornacherstrasse 60—62, BASEL 4002

MEROPOLITAN VERLAG, Teichweg 16, 4142 MÜNCHENSTEIN

USONO: FAM BOOK SERVICE, 69 Fifth Avenue NEW YORK, N. Y. 10003

HUNGARIAN BOOKS AND RECORDS, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: LUIS TARCSAY, CARACAS, Apartado 50892

VJETNAMO: XUNHASABA, Phong Phat 166 sor n Hanh Bao Chi, 17 Dinh Le HANOI, RD

Hungaroj ekabonu por eksterlandanoj!

E HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
VIII. Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1976. 2-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Császár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaki-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poĉtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 6,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

477 76. 1., Somogy m. Ny. 3000
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377

LEHEL

L-230 **



temperaturo de profunde malvarma ujo de fridkesto: —12°C

garantio por 2 jaroj

prezo: 5 900,-FT

Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR

NOVAĴO

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapesto:
I. Hess András tér 3.
VI. Népköztársaság utja 27.